

Zagreba Esperantisto

ISSN 1846-5021

GAZETO DE
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

ԹՈՒՆԻՆՅԱԿ
ՅԵՐԱՅԵՆԿՔՄՈՋԸՄՅ

Ĉi-numere legu pri:
**VOJAĜRAPORTO EL POLLANDO
MILITHISTORIO DE ZEF PLLUMI
PIRAMIDOJ EN BOSNIO, ĈU?
VIZITE AL "LEGENDO PRI KOKOJ"
KROATA KONTRIBUO AL LA
ESPERANTA LITERATURO
NI PREZENTAS RUSS WILLIAMS**

1

2009

Zagreba Esperantisto

Numero 1 (11)

Jaro III

februaro 2009

www.zagreba-esperantisto.hr

RESUMO

Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

Ĉefa redaktoro:

Josip Pleadin
B. Jelačića 138 A
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
josip.pleadin@gmail.com

Respondeca redaktoro:

Radenko Milošević
Goljak 43
HR-10000 Zagreb
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

Redaktejo kaj ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
grafokom@kc.htnet.hr
zagreba.esperantisto@gmail.com

Redakcianoj:

*Snježana Habulin, Vida Jerman,
Jozo Marević, Radenko
Milošević, Velimir Piškorec,
Josip Pleadin, Mato Špekuljak*

Presis:

Grafokom, Đurđevac

Aperritmo:

Ĉiun duan monaton (februaro, aprilo, junio, aŭgusto, oktobro, decembro). En 2009 aperos ses numeroj.

Jarabono por 2009:

en Kroatio: 75,00 kunaĵoj
al ĝirkonto de UZE
2340009-1110321529
alilande: 15,00 eŭroj
al UEA-konto: uzes-y

Perantoj:

UEA, Nieuwe Binnenweg
176, NL-3015 BJ Rotterdam
libroservo@co.uea.org

Orbis Pictus, Via Parini 5
IT-34129 Trieste
orbispictus@iol.it

La unua numero de la tria jarkolekto nun troviĝas en viaj manoj. Enkonduke ĝi prezentas al vi la vojaĝraporton pri Pollando, kie la ĉefredaktoro troviĝis komence de februaro. Nerekte, ankaŭ la recenzo el la plumo de Mikaelo Bronštejn rilatas al Pollando, ĉar ĝi pritraktas la ampleksegan biografion de Lidia Zamenhof, la filino de Ludoviko. Krom la movadaj informoj troviĝantaj en la rubriko "Tra la mondo", ni tamen volas doni du specifajn trajtojn al nia revuo: unu estu la nacia, kroata, kaj la alia internacia dimensio de la publikigataj tekstoj. Vario de kunlaborantoj, vario de temoj ... nia revuo ne ŝrumpas sed dikiĝas, kaj ne estas facile decidi kion publikigi kaj kion (provizore) ne ... Por ĉi tiu numero ni elektis du aferojn tipe balkanajn, ĉar kelkfoje la legantoj atentigis nin, ke ili volas legi pri la regionoj de sudorienta Eŭropo, ankoraŭ nesufiĉe konataj. En la freŝa numero vi trovos pro tio la tradukon el la albana literaturo kiu tuŝas la milithistorion kaj albanajn morojn, kaj interesan artikolon rilate la scienca enigmo pri piramidoj en Bosnio kaj Hercegovio. Pluras literaturaj, poeziaj kaj prozaj, de aŭtoroj jam konataj aŭ tute novaj kaj promesplenaj ... Ni ofertas al vi ankaŭ eseon pri literatura kontribuo de kroatoj al la Esperanta (originala kaj traduka) literaturo. Iom da Esperanta historio, nekrologa omaĝo al niaj forpasintaj samideanoj, sed ankaŭ mencio de la plej aĝa kroata esperantisto, nuntempe - 103-jara.

Kiel kutime, nia leterkesto ĉiam estas plenplena, ĉar multaj niaj legantoj skribas kaj per tio donas al ni novan impulson por daŭrigi.

Aparte ni atentigas vin pri la mezpaĝa prezento de unu el la plej konataj turismaj vizitindaĵoj en Kroatio, kiu pasintjare fariĝis laŭreato de la titolo "Eŭropa celloko de bonkvalito" kaj reprezentis Kroation diverslande. Temas pri la manifestacio "Legendo pri Kokoj" (originale: "Legenda o Picokima"), kiu okazas en Đurđevac, la loko kie estas redaktata kaj presata nia gazeto, kie estas planata nia Dokumenta Esperanto-Centro, kaj kiun ni, gviditaj de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj, vizitos ĉi-junie precize dum la manifestacio! Pli detalajn informojn vi povas legi en la artikolo, sed ni dissendos apartan informon pri busekskurso okazonta la 27-an de junio, al kiu povas aliĝi esperantistoj kaj iliaj neesperantistaj amikoj. La buso startos en Zagrebo kaj post buntprograma restado en Đurđevac reveturigos la ekskursantojn al la kroata metropolo. Aliĝu kaj kunfestu la "Kokofeston" kun ni. Agrablan legadon deziras plenkore

La redakcio

RENKONTE AL LA ILEI-KONFERENCO

 Josip Pleadin

Ne ekzistas pli oportuna momento por viziti Pollando ol estas la jaro 2009. Vi ja scias: ĝi estas la lando kiu gastigos la UK-on, sed ankaŭ malpli grandajn aranĝojn, certe vizitindajn. Unu el tiaj sendiskute estas la 42-a ILEI-konferenco, kiu okazos julie (inter la 17-a kaj 25-a) en la perlo inter polaj urboj - en Krakovo.

Invitita de la instruista sekcio ILEI-Pollando, mi decidis viziti la landon anticipe, pro pluraj kialoj. Mi deziras redakti numeron de "Zagreba Esperantisto" kiu estos grandparte dediĉita al la ĉi-jaraj polaj eventoj. Certe mi volis renkonti ankaŭ multajn polajn esperantistojn kaj studentojn en la interlingvistikaj studoj de la Poznana universitato, kaj transpreni la Premion "Spegulo" kiun al mi atribuis la revuo "Spegulo" pasintaŭtune dum Arkones. Tamen, la graveco de mia vizito ligiĝas ĉefe al la ILEI-konferenco, ĉar la LKK invitis min fariĝi membro de la organiza teamo, kaj esplori la surlokan situacion.

Mia unua celo estis la urbo Krakovo, kiun mi atingis frumatene la 31-an de januaro. En la fervoja stacidomo atendis min mia gastiganto Piotr Nosek, la prezidanto, al kiu dum la posttagmezo aliĝis ankaŭ Małgosia Komarnicka, sekretario de ILEI-Pollando. Kun ilia helpo, en la domo de konata pola poetino esperantistino Lidia Liĝeža mi preparis la interkonan "kroatan vespermanĝon" vizititan de pluraj esperantistoj: Andrzej Kołpanowicz, Włodzimierz Opoka, Grażyna Porada, Piotr Nosek, Lidia Liĝeža, Edward Malewicz kaj Małgosia Komarnicka.

La sekvontan tagon, la 1-an de februaro (dimanĉo), tra la mondfama salminejo Wieliczka gvidis min la oficialaj turismaj gvidistoj Magdalena Tatara kaj Pieter Nosek, akompanitaj de Małgosia Komarnicka kaj Andreo Sochacki. Tiu famega loko estos unu el la ekskursceloj de la ILEI-konferencanoj, kaj mi kiu unuafoje vizitis kaj admiris la lokon, ne senkaŭze konsilas al ĉi-jaraj vizitontoj de Pollando nepre veni al la urbeto Wieliczka en senpera proksimeco de Krakovo kaj vidi la monumenton de monda heredaĵo el la listo de UNESCO.

Samtage je la 17h00 okazis amika renkontiĝo kun esperantistoj en la restoracio "U Literatów", kiu estos la loko de la bankedo

dum la ILEI-konferenco. Tie mi havis la eblecon prezenti kelkajn proprajn projektojn, aparte la revuon "Zagreba Esperantisto" kaj la projekton de Dokumenta Esperanto-Centro prezentita unuafoje pasintjare en la Universala Kongreso en Roterdamo. La renkontiĝon partoprenis Ela Hareźlak, Grażyna Porada, Andrzej Kołpanowicz, Joachim Kołpanowicz, Magdalena Tatara (kasisto de ILEI-PL), Andreo Sochacki, Piotr Nosek (prezidanto de ILEI-PL), Małgosia Komarnicka (sekretario de ILEI-PL) kaj Henriko Kramarczyk, kiu cetere sponsoris la renkontiĝon.

La plej grava tago dum mia restado en Krakovo certe estis lundo (la 2-an de februaro), dum kiu kun la reprezentantoj de ILEI-Pollando (Małgosia Komarnicka kaj Piotr Nosek) mi vizitis la estontan konferencojn, kiu cetere estas WSZiB (Wyższa Szkoła Zarządzania i Bankowości = Supera Lernejo de Direktado kaj Bankismo). Dum la vizito ni renkontiĝis unue kun la teknika direktoro de WSZiB s-ro Stanisław Kuc kaj poste ankaŭ diskutis pri la konferencaj detaloj kun la rektoro s-ro Włodzimierz Roszczynialski. Samtage ni renkontiĝis ankaŭ kun la direktorino de la Publika elementa lernejo el Ĉajovice, s-ino Barbara Przybylsz-Wojciechowska.

Mardon, la 3-an de februaro, akompanita de Piotr Nosek (kiu forlasis nin en Vroclavo) kaj Małgosia Komarnicka, mi direktiĝis al Poznano, la urbo kiu famiĝis pro la postdiplomaj interlingvistikaj studoj en la Universitato Adam Mickiewicz. Tie ĝisatendis nin Teresa Liberska kun sia edzo, kiuj dum postaj tagoj, kune kun Małgosia Komarnicka, estis miaj konstantaj akompanantoj al interesaj lokoj de Poznano. Mi loĝis en la universitata hotelo Jowita, kune kun la profesoroj kaj studentoj de la interlingvistikaj studoj, kiuj kolektiĝis inter la 1-a kaj 6-a de februaro por sia prelegsesio kaj por fari ekzamenojn. Por mi aparte interesaj estis la ekzamenoj, speciale pro tri kroataj studentinoj. Per aparta komplezo, mi kiel redaktoro de "Zagreba Esperantisto" rajtis partopreni ĉiujn aranĝojn de la sesio, kaj aparte mi interparolis kun la aŭtorino kaj gvidantino de la interlingvistikaj studoj d-ino Ilona Koutny, pasintjara Esperantisto

daŭrigo ➡ paĝo 4

Vojaĝraporto

➔ daŭrigo el la paĝo 3

de la jaro. Mi partoprenis du ekzamenojn la 4-an de februaro kaj la prelegojn de Ilona Koutny, Vera Barandovska-Frank kaj Lidia Ligeza/Tomasz Chmielik (la 5-an de februaro). La ekzamenajn sukcesojn ni festis en konata pozdana bierejo tostante per kuirita biero kun mielo. Dum la 6-a de februaro, gviditaj de Teresa Liberska kaj ŝia edzo, ni vizitis la plej grandan bierfabrikon ("Lech") en Pollando kun 45-procenta produktado de la tuta



Kroata vespermanĝo en Krakovo



Renkontiĝo en "U Literatów"



S-ro Kuc, la prezidanto de WSZiB

bierkvanto de Pollando.

La sabatan ekskurson al Toruń mi ne ĝuis, sed ripozis kaj preparis min por reveno al Kroatio.

La plej bela travivaĝo certe estis prezento de nia gazeto kaj transpreno de la premio "Spegulo" en la restoracio "Oaza" en Poznano, atribuita al mi dum la pasintjara "Arkones".

Mi sincere dankas al ILEI-Pollando kaj ĝia estraro, kiuj estis miaj gastigantoj dum la tuta vojaĝo.

Ĝis revido en la 42-a ILEI-konferenco en Krakovo.



Gvidantoj de ILEI-PL en Wieliczka



La konferenco de ILEI en Krakovo



Profesoro Galor kun siaj studentoj





T. Chmielik kaj L. Ligęza kun la studentoj



Ilona Koutny kun la studentoj



Bierfesto post sukcesaj ekzmenoj



Solenajo en la restoracio "Oaza"



"Zagreba Esperantisto" prezentiĝas



Enboteligo de biero en la bierfabriko "Lech"



Maljuna biermajstro en "Lech"



Bierspecoj gustumitaj en "Lech"

REKTE, KURAĜE, ELEGANTE!

Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof, Filino de Esperanto. Wendy Heller. Tradukis B. Westerhoff. FEL. Antverpeno. 2007. 398 paĝoj. Prezo: 27.60 eŭroj Klarigo: Aŭtoritata biografio pri la filino de la iniciatinto de Esperanto.

Mikaelo Bronŝtejn

De jaro al jaro la vivobildo de Lidia Zamenhof estas fidinde disvolvita en 30 ĉapitroj kaj prologo kun epilogo. Tiun bildon abunde ilustras diraĵoj de mem la protagonistino kaj ne malpli abunde – diraĵoj de la ĉirkaŭintaj homoj pri ŝi. Ankaŭ sesdek bonkvalitaj fotoj, karikaturaj kaj dokumentkopioj. Antaŭparoloj – por la anglalingva kaj por la Esperanta eldonoj, fontindikoj kaj indekso inde kompletigas la verkon.

La aŭtorino povus komenci la rakonton pri Lidia ekde ŝia naskiĝo, garninte, eble, la komencon per kurta ekskurso en la vivon de la parenkaro kaj per referencoj al kelkaj biografiaj verkoj pri la eminenta patro. Sed ŝi ne iris tiun vojon.

"Ĉar ne eblas kompreni (MB) Lidian, ne konante Ludovikon, ŝia historio vere komenciĝs per la lia." – kun tiu opinio Wendy Heller enlibrigas tri unuajn ĉapitrojn sen Lidia, donante per ili bazajn konojn pri la vivo kaj vivkonceptoj de ŝia patro. Sinsekve la tri ĉapitroj havas nomojn: "La doktoro kaj la revo", "Esperanto" kaj "La Interna Ideo". Pozitivaj opinioj pri Ludoviko kaj pri Esperantomovado nepre influas formiĝon de samopinio ĉe leganto ne esperantista. Normale Ludoviko ĉeestas ankaŭ en postaj tri ĉapitroj – jam kun la rolo de patro, edukanto kaj inspiranto. Tiun ĉi lastan rolon vere gravas kompreni por ne miri poste, ke la filino, en infanaĝo indiferenta por la inventaĵo de sia patro, perdinta lin ĉe sia aĝo nur dekkvarjara, tamen akceptis lian vojon kaj restis fidela al lia ideo dum la tuta vivo.

"Rekte, kuraĝe, elegante!" Jen estis la ĉefa vivslogano de Lidia, iom ŝanĝnata la vortojn de Ludoviko, la slogano por ŝia konscia vivo, por la

Estante ekde jardekoj arda ŝatanto de biografiaj verkoj, mi konvinkigis ke,


a) ĉiu ajn biografia verko ne povas esti konsumita unuglute, ĉar estas fakte la homa vivo, kiun vi emas enkapigi kaj kompreni;

b) ĉiu ajn biografia verko ne estu akceptata kiel veraĵo en la lasta instanco, t.e., se la persono interesas min, mi ne pigru eltrovi almenaŭ unu-du aliajn informfontojn pri la persono.

Do, kiam min atingis freŝeldonita de FEL libro "Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof. Filino de Esperanto", tiu libro estis por mi ne la unua fonto de scio pri koncerna persono. Sed, tra leginte la libron kun apliko de mia a-konvinko, t.e. dum kelkaj monatoj, farante paŭzojn inter la ĉapitroj, mi rajtas opinii ĝin esence fundamenta kaj faktoplena verko, utila por la esperantologio. Ankaŭ leginda de ĉiu, kiu ŝatas mergiĝi en la historion ne nur de nia movado, sed de tiu epoko kruela, mondrenversa, eventoriĉa, kia estis la unua duono de la 20-a jarcento.

La vivo de Lidia Zamenhof, glora kaj kompatinda filino de la Majstro, la vivo, kiu daŭris nur tridek ok jarojn kaj estis feroce rompita kune kun ses milionoj de aliaj judaj vivoj, la vivo brila kaj sindona - sendube meritigis detalan intervenon de sperta biografiisto. Estas grava bonŝanco, ke tiun

intervenon efektivigis Wendy Heller, profesia lingvisto kaj renoma verkistino. Estas grava bonŝanco, ke la libro estis verkita en la angla kaj eldonita en Oxford. Ĉar, laŭmerite okupante bretlokon apud gravaj



biografiaj esplorverkoj, la libro pri Lidia Zamenhof nepre altigos aŭtoritaton de Esperanto – kaj de la lingvo, kaj de la movado. Estas grava bonŝanco, ke, (ho ve, - nur post pli ol dudek jaroj!) per komuna laboro de la tradukinto Bernhard Westerhoff kaj la aŭtorino mem, la biografio de Lidia, ensorbinta suplementan faktaron, intertempe akiritan, atingis Esperantlingvan leganton.



mondvojaĝo celanta propagandi kaj instrui Esperanton. La libro montras maturiĝon de Lidia, kiel Ĉe-metoda instruistino kaj ŝian triumfan instruadon en eŭropaj landoj. En nia dudek unua jarcento, provizanta abundajn logaĵojn, ni pene povas imagi centpersonajn pagatajn kursojn de Esperanto. Sed Lidia rikoltis tiujn en multaj urboj kaj sukcese gvidis siajn milojn da gelernantoj en Esperantujon. Tiun gloran vivoparton la aŭtorino prezentas kun skrupula detaleco. Ankaŭ la sekvantan usonan periodon, ombriĝitan per malsanoj, malestimo kaj eĉ klaĉado de kelkaj Esperantlingvanoj – ho, tiutempa ekstera trankvileco de Lidia estas enviinda kaj imitinda!

Jen kaj jen intervenas en la ĉapitroj la bildoj de naskiĝanta kaj evoluanta nazia koŝmaro. Tiun akompanas nehoma malamo al unu gento, al judoj – ne nur en la nazia Germanio, sed ankaŭ en aliaj eŭropaj landoj, ĉefe en Pollando, la patrujo de Esperanto kaj de Lidia. Wendy Heller donas al la leganto komprenon pri radikoj de tiu malamo: dum mavaj vivkondiĉoj de la intermilita tempo la politikistoj devus inventi iun kulpulon por pravigi suferojn de siaj popoloj. Per speciale inventata, konstanta, senhonte kalumnia agitado, ili sukcese enkapigadis al la amasoj, ne ŝatantaj mediti kaj analizi, ke estas la judoj, kiuj kulpas pri ĉio. La situacio pli kaj pli ardiĝas en 1938. Tiam la germana registaro decidis deporti ĉiujn polaj judojn, loĝintajn dum multaj jaroj en Germanio, reen al Pollando, sed la patrolando ne volas akcepti ilin!

Tamen, mi pensis, kiel tio koncernu Lidia-n? Ja tiutempe ŝi estis en Usono kaj havis plurajn invitojn por gvidi Ĉe-kursojn. Kiel do okazis, ke tiu plezure akceptata, atendata kaj dezirata instruistino estis devigita reiri al Eŭropo, al Pollando, renkonten al sia morto? La libro detale prezentas evoluon de la eventoj, do mi konkludas, ke parton de la

kulpo pri ŝia perejo prenas multaj homoj. La usonaj burokrataj instancoj, postulantaj ŝian foriron – ĉu ili ne estis informitaj pri la situacio en Pollando? Mi dubas. La kanadaj esperantistoj, rifuzintaj la inviton por Lidia – pro antaŭvidataj komplikaĵoj ĉe preparo de la dokumentoj. La religia gvidanto de Lidia – lin ŝi demandis ĉiam antaŭ fari vican paŝon en la vivo. Jes, li telegrafis, rekomendinte reveni al Pollando, sed, loĝinta en Persujo, eble li ne havis ĝustajn informojn pri la minacoj por la judoj en Eŭropo. Ankaŭ mem Lidia, kies kristala pureco ne permesis mensogi, do ĉe enketo ŝi skribis honeste, ke estis ricevinta monon por sia kursgvidado, sekve malobeis la usonajn leĝojn ...

"Se mi forlasis Amerikon, - skribis ŝi al franca korespondanto, - eble estas pro tio, ke Dio preferis, ke mi laboru en alia lando. Kaj en la elekto de Dio la decida konsidero estas ne mia kontenteco, ne mia plezuro, nek eĉ mia sekureco – sed la laboro, kiun mi povas kaj devas fari".

Ĝis nun mi neniel menciis la konatan fakton, ke

Lidia estis adepto de la Bahaa religiupaĝe ĉeestas en la libro de Wendy Heller. La Gardanto, Shoghi Efendi, kiun ŝi konsultas konstante. Ŝiaj multnombraj geamikoj-samreligiaj, amekaj helpeme akceptantaj ŝin en ĉiuj landoj. Ŝiaj pensoj, venintaj en ŝiajn leterojn – pri Dio, pri la kredo, pri ligo inter la Bahaa religio kaj Esperanto. Al mi, ateisto pro analfabeteco, plaĉas, ke la aŭtorino neniom trudas al la legantoj la religiajn preferojn de Lidia, rakontante pri tiuj egale samkiel pri ĉiuj vivnuancoj, gravaj por la biografio.

La traduko legeblas senpene, ĝuide, sed fojfoje mi stumblis ĉe kelkaj frazoj, nekutime konstruitaj aŭ ĉe vortoj, nePIVE uzitaj. Mi kursivigu kelkajn ekzemplojn: "Multaj venis el eksterlando por viziti d-ron Zamenhof, preskaŭ kiel *pilgrimadon*". (p.59) "Sur la scenejo staris la eta Lidia, ŝia *aparato*, respektive tradukanto kaj du aliaj esperantistoj." (p.199) "Lidia iris hejmen al Varsovio *dum* kelkaj semajnoj..." (p.232). Sed se mi pritaksu la tuton, certe, laboro de Bernhard Westerhoff meritas sinceran dankon.

CERBAJ IMPULSOJ

✍ *Dinko Matković*

- La diferenco inter juneco kaj maljuneco estas ... estas - diablom, mi denove forgesis.
- Ju pli malmulte vi ellernas dum junaĝo, des pli facile vi forgesas tion dum maljunaĝo.
- Grandaĝuloj estas feliĉaj kiam ili povas rememori kiam ili estis feliĉaj en juneco.
- Ĉiuj homoj sciis ĉion se la triono de la homaro ne estus skleroza.
- Sin mem amanta maljunulo havas ĝistombe asekuritan amon.
- Pli frue aĝaj generacioj transdonadis sciojn, spertojn kaj lertojn al junaj generacioj. Nuntempe pli kaj pli tiuj valoroj estas vendataj al ili.

ONI DIRIS ...

✍ *Małgosia J. Komarnicka*

Oni ne vivas, oni ne amas, oni ne mortas por provo (por eksperimento).
(Karol Wojtyła)

Ni rapidu ami homojn, tiel rapide ili forpasas.

(Jan Twardowski)

INTERNACIA SEMINARIO NE PLU OKAZOS

La legenda junulara aranĝo konata laŭ mallongigo IS (=Internacia Seminario), post pli ol duonjarcento ĉesos ekzisti. Ĝi okazadis ĉiusilvestre en alia germana urbo, kaj ĝi estis unu el la plej gravaj porjunularaj aranĝoj en Esperantujo organizata de Germana Esperanto-Junularo. Komence ĝi vere estis seminario, sed poste ĝi fariĝis kultura kaj distra aranĝo, kiu kulminis per Silvestra balo. La unua okazis en Mainz (1957-58), kaj la lasta en Biedenkopf (2008-09). En 2002 ĝia rivalo fariĝis AS (Ago-Semajno). Dum la unuaj kvar jaroj organizis ĝin la klubo "Varsovia vento" kaj Pola Esperanto-Junularo en Zakopane (Pollando) kaj en 2006-2007 en Nowy Sącz, poste en Malbork kaj laste en Liptovský Mikuláš (Slovakio). Ekde la venonta jarŝanĝo la du aranĝoj IS kaj AS kuniĝos sub la titolo "Junulara E-Semajno" (JES), la komuna aranĝo de Germana kaj Pola Esperanto-Junularoj. Tian evoluon kaŭzis drasta falo de la nombro de partoprenantoj ĉe du preskaŭ samtempaj jarfinaj aranĝoj. La unua JES kredeble okazos en Zakopane.



TUTMONDA ESPERANTISTA JURNALISTA ASOCIO REGISTRITA EN LITOVIO

Post longa klopodado en la fino de decembro 2008 Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio estis oficiale registrita en Litovio. TEĴA estas la unua internacia organizaĵo, kiu havas sian ĉefsidejon en Litovio. Tiu specifaĵo prokrastis la registradon, ĉar ĝis nun ekzistis precedencoj nur pri registrado de filioj de jam jure ekzistantaj internaciaj organizaĵoj kun



ĉefsidejo aliloke. Plia kaŭzo de la prokrasto estis problemo pri jura adreso de la asocio. La efektiva sidejo de TEĴA en la oficejo de Litova Esperanto-Asocio en Vilno ne estis akceptita, ĉar daŭras jura proceso pri disputo rilata al la posedo de la ejo. Grava municipa oficisto opinias, ke la ejo estis donita al LEA nur por provizora uzo, kaj ke ĝi devas esti liberigita. Kvankam Litova Esperanto-Asocio gajnis la proceson en la unua instanco, la sekva instanco nuligis la decidon, kaj la fina decido estas atendata. Tial oni unue provis uzi la adreson de la sidejo de LEA en Kaunas, sed montriĝis, ke tiu ejo pro financaj kaŭzoj formale estas posedata de la municipo, kaj ankaŭ ĝin sekve ne eblas uzi kiel juran sidejon de TEĴA. Fine oni trovis taŭgan formalan juran adreson ĉe alia oficejo en Vilno.

Poste montriĝis necese havigi al notario kopiojn de la pasportoj de ĉiuj fondantaj estraranoj. Fine la 18-an de decembro la ŝtata registra centro de Litovio enigis en la Registron de juraj personoj Tutmondan Esperantistan Ĵurnalistan Asocion kaj donis al ĝi la entreprenan kodon 302290854. La atestilo pri la registriĝo estis transdonita al TEĴA la 22-an de decembro. Helpo de tiu atestilo TEĴA nun povas mendi oficialan

stampilon, helpo de la stampilo malfermi bankkonton, kaj poste jam eblos produkti la planatajn membrokartojn. Laŭ la stato de la 5-a de marto 2009 Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio havas sume 105 membrojn el 38 landoj. Plej multajn membrojn havas Pollando (12), sur la dua loko estas Litovio (11) kaj sur la tria Germanio (8). TEĴA jam de pluraj monatoj posedas propran retejon: www.tejha.org.

ILONA KOUTNY - ESPERANTISTO DE LA JARO 2008

De dek jaroj jurio kunmetita de la gazeto "La Ondo de Esperanto" elektas "Esperantiston de la jaro". Por la jaro 2008 tiun titolon ricevis Ilona Koutny, hungarino loĝanta en Pollando, pro la kompetenta kaj sukcesa gvidado de la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznano. Ŝi aparte meritis rekonon pro la dekjarigo de la Studoj, pro la ekzamensio de la tria grupo, pro la unua instrurajta ekzameno kune kun ILEI, pro la komenco de la kvara grupo, kaj speciale pro la simpozio "Lingvistikaj kaj kulturaj aspektoj de interlingvistiko", kiun ŝi pretigis kaj efektivigis en septembro 2008 ĉe UAM. Ilona Koutny ricevis 12 voĉojn de la ĵurio. Kvar voĉoj iris al Peter Baláž. Po tri voĉojn ricevis Katalin Kováts kaj Geoffrey Sutton. Po du estis donitaj al Normand Fleury kaj Yves Nevelsteen. Tri



kandidatoj ricevis po unu voĉon. Dek unu kandidatoj restis sen voĉo donita. Ilona Koutny estas la unua virino, kiu ricevis la titolon "La Esperantisto de la Jaro". Ŝi ankaŭ ricevis rekorde multajn voĉojn kompare kun la aliaj kandidatoj - trioble pli ol la slovaka aktivulo Peter Baláz, kiu okupis la duan lokon. Kiel la unua "Esperantisto de la jaro" en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Kep Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste estis distingitaj Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ab Iago (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005), Bertilo Wennergren (2006) kaj Peter Zilvar (2007).



EU-PARLAMENTANINO LJUDMILA NOVAK PLEDAS POR ESPERANTO

Ljudmila Novak, slovena ano de la kristdemokrata grupo Eŭropa Parlamento, prezentis la 21-an de januaro al la parlamenta komitato pri kulturo kaj eduko kiam estis traktita la raporto pri multlingveco, proponon pri enkonduko de Esperanto kiel komuna lingvo de Eŭropa Unio. Laŭ ŝia amendopropono, al la raporto devus esti aldonitaj tri punktoj. Ŝi klarigis, ke la propono certe estos malakceptita en voĉdonado, sed ke ĝi tamen povas utili por krei diskuton pri lingvaj problemoj kaj la eventuala rolo de Esperanto.

**KULTURA
ESPERANTO
FESTIVALO**
7/7-12/7 2009
Helsingør-Danio
www.kef.saluton.dk

La festivalo KEF (Kultura Esperanto-Festivalo) denove okazos en Danio. Ĉi-foje estos en la ĉarmega urbo de Hamleto (almenaŭ de lia kastelo): Helsingør/Elsinoro. La datoj estas de la 7a ĝis la 12a de julio 2009.

Nun la 9an fojon junuloj en Nordio aranĝas la Kulturalan Esperanto-Festivalon, ĝis nun ĝi estis organizita en Svedio, Finnlando kaj Danio. Ĝi estas festivalo kiu prezentas altkvalitan originalan Esperanto-kulturon.

KEF estas unika loko por la Esperanto-kulturo. Ĝi estas la loko kie Esperanto-artistoj povas renkonti aliajn artistojn. Ĝi ankaŭ estas la loko kie vi povas interkonektiĝi kun la abunda vivo de la Esperanto-kulturo kiel spektanto de la multaj koncertoj, teatraĵoj, kaj literaturaj prezentoj. Sed vi ankaŭ mem povas partopreni aktive en la multaj metiejoj. Interalie vi povas lerni poemi en Esperanto, partopreni dancatelieron, legi kaj fari komiksojn, ludi ludojn en Esperanto, ktp. Nur en KEF vi povas ekz. karaoke-kanti en Esperanto, ne kun maŝino sed

Gosia Nitkowska

vive kun la artistoj mem, (se vi estas infano) partopreni la unuan rokbandon por infanoj aŭ fari la unuan cirkon en Esperanto!

Amaso da bonaj konataj Esperanto-artistoj distros. Jam nun ni scias ke venos: Jomart kaj Natasha, Martin Wiese kaj la Talpoj, Hotel Desperado, La Perdita Generacio, Pafklik kaj D.C. Inicials, kaj pluraj aliaj artistoj estos anoncigitaj en la hejmpaĝo. Dum ĉiu nokto Flo de Vinilkosmo estros diskotekon kun dancmuziko nur en Esperanto. Cetere vi povas spekti filmojn en Esperanto, kaj plene ĝui la plej grandan kulturalan Esperanto-aranĝon.

La festivalo estas festivaleja en sia formo, tiusence ke oni loĝos modeste kaj tiamaniere la kostoj ne estas tiom altaj, kvankam Danio estas unu el la plej multekostaj landoj en la mondo. Kompreneble eblas ankaŭ loĝi pli lukse en migrulhejmo aŭ en hotelo kontraŭ aldona kosto.

En la semajno tuj antaŭ KEF, en Danio okazas la plej granda Rokfestivalo en Nordeŭropo - Roskilde Festivalo. La dana esperanto junularo (DEJO) organizas senpagan Esperantan renkontiĝon dum la festivalo. Ĉiuj laboras 24 horojn en la DEJO-budo. Ĉiuj en 3 okhoraj periodoj. Dum la resto de la tempo vi povas festi kun la aliaj aŭskulti koncertojn kaj eĉ gajni monon por partopreni KEF.

Vidu ĉe www.kef.saluton.dk pri pli da detaloj, la diversaj metiejoj kaj kotizo.

ĈU VI JAM REABONIS "ZAGREBAN ESPERANTISTON"?

LA BIBLIA LEGENDO PRI LA BABILONA TURO JE EKZEMPLO DE MALINTEGRIĜO DE SOVETA UNIO

Ĝ. Fajzullaev

La Biblia legendo diras ke, iam sur la Tero estis unu lingvo kaj la homoj bone komprenis unuj la aliajn. Ankaŭ la regado estis sola – la Dia. La homoj decidis konstrui altan turon por atingi la ĉielon. Al la Dio tio ne plaĉis, ĉar la ĉielo estas Dia trono. La Dio punis la homaron per diverslingveco. Diverslingveco kaj, do, dividi homojn laŭ naciaj signoj, estis Dia malbena. Aperis multaj lingvoj, homoj ĉesis kompreni unuj la aliajn, disdividis sin. Rezulte de tio aperis nacioj kaj ŝtatoj. Surbaze de tio aperis sklavposeda socia ordo. La Bibliŝon verkis tre spertaj homoj. Versajne ne estis ebleco ĉiam skribi malkaŝe kaj multaj eventoj estis priskribitaj per legendoj.

Iam ni vivis en la granda multnacia ŝtato nomita Soveta Unio. En Soveta Unio ni havis unu lingvon por interkompreniĝi inter diversaj popoloj de la ŝtato. Tiu lingvo estis la rusa. Ĝi estis ne nur por interkompreniĝo, sed ankaŭ por amikeco, frateco kaj interhelpo

de diversaj popoloj de la granda ŝtato. Ekzistis multaj naciaj lingvoj, sed rusa lingvo ne malhelpis la ekziston de aliaj lingvoj. La regantoj de Soveta Unio havis ideon konstrui novan socian ordon - komunismom. Denove ili estis punitaj, sed al ĉi tiu puno kondukis la popolon reprezentantoj de diversaj nacioj. Aperis homoj, kiuj organiziĝis en sociajn grupojn, kiuj deklaris superecon de propra nacio kaj nacia lingvo. La homaro, el morala vidpunkto, bedaŭrinde, ne malproksimiĝis de la sklavposeda mentalo. La homaro ignoris Diajn ordonojn, en kiuj estas deklarataj: ne mortigu, ne ŝtelu, ne volu posedi aliulajn aĵojn. Krom tio, tiun stampon de sklavposeda sistemo uzas iuj homoj por krei koliziojn inter diversaj popoloj laŭ naciaj kaj lingvaj signoj kaj trajtoj. Tiuj homoj nomis sin patriotoj. Okazis sociaj konfliktoj pro aparteno al diversaj nacioj, verŝiĝis homa sango. En kelkaj respublikoj de la granda ŝtato okazis civitanaj militoj. Rezulte la granda ŝtato

malintegriĝis al kelkaj ŝtatoj laŭ naciaj trajtoj. Tiam estis nekomprenebla, kiu bezonas tion kaj kio estas la elo de tiu agado. Poste ĉio klariĝis. Tiuj populaj naciaj patriotoj akiris la regpovon kaj nun estas posedantoj de grandaj populaj riĉaĵoj. Fina celo de tiu agado estis redistribuo de la regado. Lingva problemo estis nur preteksto de la redistribuo. Multlingveco faciligis tion.

La tuta historio de la homaro montras, ke unu lingvo, komprenata de ĉiuj, estus beno por la homaro. Ĉi problemon provis solvi la plej elstaraj pensuloj de la mondo. Post jarcentaj esploroj en 1887 aperis projekto de la plej vivanta internacia lingvo Esperanto – facila, neŭtrala kaj riĉa. Ĝin inventis L.L. Zamenhof - homo, kiu havis altajn moralajn kvalitojn. Esperanto estas lingvo ne nur por interkompreno, amikeco, frateco, sed ĝi estas la lingvo, kiu proksimigas nin al la moralaj kaj idealaj, deklarataj en la sankta libro - la Biblio.

VIRINA TAGO 2009 *ĉ Dinko Matković*

Virinoj estas patrinoj, edzinoj, fratinoj, ili estas zorgema kaj sentema familia spirito. Ni viroj ne scias sufiĉe kiom da doloroj kaj suferoj ili devas elteni ĝis kiam ili naskas infanojn kaj kiom da flegoj kaj zorgoj ili dediĉas al siaj idoj poste, ĝis kiam ili mem povas zorgi pri siaj vivoj.

Pro tio mi bone komprenas virinajn organizaĵojn de Hiroŝimo, kiuj ĉujare, okaze de la 8-a de marto sendas alvokon al la homaro, unuavice al potenculoj, por eble vekti ilian konsciencan. La virinoj el gubernio Hiroŝimo

memorigas pri la plej danĝera malbono por popoloj, pri militoj, kiuj kaŭzas multnombrajn viktimojn kaj suferojn. Ankoraŭ estas freŝaj al ni TV-bildoj de la milita operacio en Gazo, en Palestino, kies rezulto estas ne nur mortigoj de soldatoj, sed ankaŭ de civiluloj al kiuj nombrigas ankaŭ infanoj. Ni povis vidi arabajn virinojn, kiuj krianter ploras apud siaj mortigitaj proksimuloj kaj apud ruinoj de siaj loĝejoj. Ni aŭskultis pri iliaj suferoj: pri manko de elektro, akvo kaj nutraĵoj.

Sed koroj de virinoj el

Hiroŝimo ne doloras nur pro la infanoj en Palestino, sed ankaŭ pro vivoj de infanoj kaj virinoj aliloke en la mondo. Ili protestas kontraŭ laboro altrudita al infanoj kaj virinoj, pro iliaj sklavvendado. Kiel ili skribas en sia alvoko, pro mizero, aparte en afrikaj kaj aziaj landoj, kaj pro la monda ekonomia krizo, multaj familioj restis kaj restas sen bezonataj vivrimedoj.

Pro tio mia subteno kaj solidareco kun vi, socialemaj japanaj virinoj. Mi deziras, ke via voĉo plifortigu, ke via apela voĉo veku prudenton de potenculoj kaj ke vi solidarece kun aliaj virinoj el ĉiuj kontinentoj atingu viajn celojn.





Sur la maldekstra foto: Esperanto-kurso en Dugi Rat en la jaro 1958.

En la lasta vico staras Anka Jurišić Sumić, Milan Buljević, la tria persono estas nekonata, Mira Trgo (mortinta), prof. ing. Ivo Vojnović kaj lia edzino Ivka, naskita Kalebić. Meze sidas (kun stelo) Olga Lozić Zemunik kaj la lasta estas la kursgvidanto Davor Grgat. En la unua vico la unuaj tri personoj estas nekonataj kaj la lasta estas Zdenko Blahut. Krom la kursanoj sur la foto, la kurson partoprenis ankaŭ: Luce Ĉepić, Ante-Tonči Franiĉević, Ivo Kadić, Ivan Lozić (barbisto), Ante Trevižan, Ivo Trgo, kaj Ante Zanki el Komiža. Dankon al la foto-servo de la ekspozicio pro la sendo kaj permeso publikigi la foton.

DUONJARCENTO DE ESPERANTO EN DUGI RAT Davor Grgat

Precize la saman daton kiam la kroataj esperantistoj festis la 100-jariĝon de Esperanto en Kroatio, la 13-an de decembro 2008, en Dugi Rat, estis malfermita foto-ekspozicio "100 fotoj por 100 jaroj de Dugi Rat", en kiu unu foto el 1958 estis dediĉita al Esperanto.

Tiujare, post soldatservo en la militmaristaro, mi interesigis la loĝantaron en Dugi Rat pri Esperanto. Tie funkciis tre sukcesa fabriko de karbido kaj cianido, kaj somere de la menciita jaro

estis organizita ekspozicio kaj kurso por Esperanto. Antaŭ tio en Gimnazio en Omiš estis organizita ekspozicio kaj prelego pri problemoj de la Internacia lingvo. La kurson partoprenis 15-opo da gejunuloj, inter kiuj ankaŭ profesoro Ivo Vojnović, Milan Buljević, Luce Ĉepić, Kadić, kaj aliaj. Pro malmulta tempo la kurso en la Gimnazio de Omiš daŭris nur kvar instruhorojn.

Konsiderinte, ke aŭtune de tiu jaro mi devis forlasi Dugi Rat kaj iri al Sarajevo, (kie mi finis B-kurson kaj

fariĝis sekretario de Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio - JEJA), la kurso ne estis finita, sed la ĉi-supra foto estas pruvo ke la Esperanto-movado en Dugi Rat kaj en Omiš havas duonjarcentan tradicion.

La ekspozicio, kiu daŭris dek tagojn, estis tre bone vizitita, kaj inter la cent prezentitaj fotoj, la vizitantoj plej ofte haltis ĉe la foto de Eperanta kurso. Sekvis komentoj: jen tiu vivas en Ljubljana, tiu en Germanio, Francio ...

100-JARA DATREVENO DE IVO LAPENNA

Du gravaj datrevenoj en 2009:

D-ro L. L. Zamenhof (150-jara) kaj **Prof. D-ro Ivo Lapenna** (100-jara).

La *Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna*, prez.: Prof. D-ro Carlo Minnaja (red. de *Eseoĵo memore al Ivo Lapenna*). 29 konataj aŭtoroj kontribuis al tiu ĉi ĉarma kaj interesa 417-paĝa verko), kaj la *Fondaĵo Ivo Lapenna*, prez.: D-ro Klaus Perko, instigas ĉiujn Esperanto-organizaĵojn, E-klubojn, E-kunvenojn k.s. ĉie en la mondo celebri la du gigantojn per multaj ekspozicioj, prelegoj kaj artikoloj en la gazetaro pri ilia enorma, eminenta kaj elstara laboro por la Internacia Lingvo, Esperanto. Ni invitas vin senpage utiligi la abundan materialon de nia hejmpaĝo: dokumentoj, paroladoj, fotoj ktp. (bv. indiki la fonton). Jen la adreso: www.ivolapenna.org

MILITHISTORIO

Fragmento el la libro "Mi vivas por rakonti" de Frato Zef Pllumi

La filoj de Zef Delia nun estas nur du. Ilia patrino estas nobla maljunulino el Shala¹, kiu apenaŭ havas similon surtere. Dum la Dua Mondmilito, komence de aprilo 1941, la jugoslava armeo eniris Dukagjinon² ĉe Kolo de Peja kaj elokupis teritorion ĝis la Kara Ponto de Postriba, survoje al Shkoder³. Dum oni estis preparanta la atakon kontraŭ la urbon, alvenis la novaĵo ke Belgrado jam falis en la manoj de germanoj, tiel la plejparto de tiu jugoslava armeo kapitulaciis al la italoj.

Sed alia parto ilia pensis pri regula retiriĝo direkte al sia patrio, revenante denove tra la subigita Dukagjino. La dukagjinanoj, antaŭvidante, ke la frakasita armeo povus kondukti pli malbone ol tiu venkinta, organizis embuskojn ĉe la Ruĝa Stonego, super Prekal⁴. Kiam la avangarda taĉmento alvenis en la Ruĝan Stonegon, ekpafis la fusiloj. Jugoslavoj jam vidis sin sieĝitaj, tial ili klopodis malfermi al si la vojon.

La embuskoj estis ĉiuflanke: jen sur la deklivo transe, jen laŭvoje. Tiu, gvidinta al la avangardo jugoslava, estis ja bravulo kiel Zano⁵ kaj per ĉiu unuopa pafo mortigis po unu homon. Sole li mortigis ĉiujn embuskulojn laŭlonge de la Ruĝa Stonego. De la kontraŭa deklivo li ricevis du-tri vundojn: ĉiujn sur la gamboj. Sed li ne haltigis la marŝon, daŭrigante supren. Li eniris la arbaron, trapasis la montan kolon, poste iris tra la juglandarbaro kaj malsupreniris ĝis la unua vilaĝo haltante ĉe ties unua domo.

Li havis du vundojn kaj pro sangado estis ege elĉerpita. Li ne povis plumarŝi. Deekstere li vokis en sia lingvo. Deinterne oni respondis:

- Venu! Bonvenu!

Estis la tagopinto. Sofio Lekja eliris ĉe la pordon kaj ekvidis la fremdan junulon vestitan per serba militosurtuto kaj kun fusilo surŝultre.


- Envenu! Gloron al nia Dio!

La junulo sidiĝis sur benketon, malstreĉis unu gambon kaj komencis involvi la pantalonon. La vundon li estis liginta per tolaĵo ricevinta la sangokoloron.

- Vundita? - ekkriis la oldulino.

Tuj poste ŝi rapide malfermis maton kontraŭflanke de la kameno. La junulo tuj ekkuŝis. La albanino elmetis el la kestego botelon da altkvalita brando, malligis la sangumitan tolaĵon kaj enverŝis brandon sur la vundon; estis ja du tiaj, unu malpligranda kaj alia granda sur la gambo; ŝi surmetis ankaŭ du tabakfoliojn. Poste ŝi elprenis el la kestego viran pufan pantalonon per kiu ŝi

At Zef Pllumi
Rrno vetëm për me tregue



Titolpaĝo de la albana eldono de la plej fama verko de Frato Zef Pllumi kun lia portreto

FRATO ZEF PLLUMI (1924-2007) estas albana verkisto kiu malfeliĉe travivis ĉirkaŭ 30 jarojn en la komunismaj politikaj prizonoj kaj koncentrejoj, kiel plejmulto el katolikaj pastroj de Albanio. Kiel franciskana pastro li estis patrioto, klerulo, ema al scienca esplorado. Post 1990 li verkis kelkajn librojn en formo de memoraĵoj pri sia pastra vivo, vivo de politika prizonulo kaj historiisto. Lia ĉefa verko titoliĝas "Rrno vetëm për me tregue", ("Mi vivas por rakonti"). En ĝi li rakontas pri la krimoj de komunismo, pri la sakrilegioj de la katolika eklezio, pri la granda spirito de popolo honesta. Interalie li priskribas tion kion li mem spertis dum sia deĵorado en la norda montaro de Albanio, tion kion li aŭdis de kamparanoj ...

envolvigis la vunditan gambon daŭre sangantan. Rapide ŝi helpis al li demeti la militan surtuton kiun li submetis sub la kapon kiel kusenon; la randofino de la surtuto havis kelkajn kuglotruetojn. Ŝi alportis alian botelon da brando kaj pecon da pano kun fromaĝo, mansignante al la kuŝanta fremda junulo por ke li ekmanĝu. Ĉi tiu, ege malsata, ekmanĝis post kiam li sorbis du-tri foje brandon. Dume ŝi eliris eksteren por serĉi sur la montaj deklivoj la sangan herbaĵon⁶. Ŝi revenis kun malgranda buketo enmane kaj komencis premi ĝin en la glaso. Tuj post kiam la junulo finmanĝis, ŝi proksimiĝis, malligis la gambon denove kaj surmetis sur la vundojn la sangan herbaĵon, poste kelkaj tabakaj foliojn kaj revolvis ĝin.

Kiam la junulo ekkuŝis, Sofia kovris lin, dume li ekdormis. Ŝi eliris ĉe la pordon. Kvankam sufiĉe malproksime de Ruĝa Stonego, tie, malsupre, la montoj eĥis pro la milito inter albanoj kaj jugoslavoj. Ŝi rigardis la montajn deklivojn. La vilaĝo estis dezertigita, nur kelkiu oldulino povus



troviĝi tie. La noveloj kun du ŝiaj malgrandaj nepoj estis rifuĝintaj en la grotoj kaj en la arbarinterno. Nur la pastoro plurestis ĉe la preĝejo. Ŝia pli aĝa filo estis kuniginta kun aliuloj por militi. La soleca patrino atendis novaĵojn. Ŝi ne povis foriĝi sufiĉe multe de la domo ĉar en ĝi jam estis rifuĝinta vundita soldato. Kiam ŝi estis enirante, ĉe la pordo de la domo ŝi ekaŭdis kriojn:

- Ho Deli Deda! Atendu nin tie!

Ŝi rekonis la voĉon: ĝi estis la voĉo de la kvazaŭfrato de ŝia pli aĝa filo. Ŝi atendis lin ĉe la hejmpordo.

- Hola, Ded Mehilli, kial vi foriris kaj forgesis la hejmon? Kion vi rakontos al mi, la patrino?

Ded Mehilli estis alveninta kun aliulo, ambaŭ portis surŝultre fusilojn kaj ĵus estis revenintaj el la batalejo. Li estis ne nur samaĝa al ŝia filo, sed estis ankaŭ bonega amiko lia, ĉar ambaŭ estis trinkintaj reciproke alies sangon, do estis farigintaj probatinoj⁷ aux kvazaŭfratoj. Pro tio, la kamaradoj de ŝia filo estis elektintaj lin kiel oportunan heroldulon por sciigi al la patrino la mortonovaĵon. Kaj li ne kuraĝis fari tion ankoraŭ. Li estis pripensanta, sed senrezulte.

Enirinte en la hejmon, ambaŭ kamaradoj eksidis sur la benketojn. Ŝi regalas ilin per glaseto da brando. Dum ili estis trinkontaj, ili ekvidis antaŭ si kuŝantan homon ĉe la kamena rando.

- Kiu estas la kuŝanto?

- Ankaŭ mi ne scias; estas ja vundita jugoslava soldato.

- Montenegro? Serbo?

- Estas homo, junulo! Ĉiuj homoj estas ja egalaj, ĉu montenegro, ĉu montaran, tutegale!

- Ĉu ni mem vidu lin?

- Ne malkovru lin ĉar nur antaŭ nelonge li ekkuŝis por ripozi.

Sed ili malkovris iomete ties vizaĝon.

- Huuu! Vidu kiu estas ja! La Diablo mem! Ni mortigu lin ĉi-momente ĉi tie ĉe la kamena rando!

- Kion vi parolas? Ĉu vi ne scias ke li estas mia gasto jam?

- Kies gasto povas esti la Diablo mem? Tiu estas ja la plej granda nia malamiko: ĝuste lin ni serĉas ĉar ĝuste li estas mortiginta vian filon!

- Mia filo havis tiun sorton en la milito, kaj se li estas mortigita de tiu ĉi homo, neniu kuraĝu ektuŝi lin ĉar li estas jam en la manoj de la filoj de Deli Deda.

- Sofi, rezonumu, ĉar baldaŭ oni alportos vian filon sur brankardo!

- Ne gravas do! Estas jam sciite ke la milito nur junulajn tombojn malfermas kaj patrinajn korojn buĉas, sed neniel oni povas toleri la honton enhejme.

Dume, la dormanta junulo vekigis kaj malkovris la vizaĝon, ekvidis la du junulojn kun fusilojn surŝultre, tro indignitaj kaj ekcetitaj, ŝajnis

ke li ektimis iomete, sed Sofio proksimiĝis kaj aldiris lin:

- Ĉu vi bezonas trinki akvon? Restu tie kaj ne moviĝu, patrino!

Tiam ambaŭ junuloj ekstaris kaj eliris eksteren dirante:

- Aŭskultu Sofi Lekja, ni estas venkintaj la sxkjau-n⁸ hodiaŭ, kaj devigis ĉiujn kapitulacii en Shkoder, krom ĉi tiu. Ni estas mortigintaj multe da tiaj, sed ankaŭ el ni estis mortigitaj kvin personoj, interalie via filo kaj du aliaj samvilaĝaj, ĉar ĉiuj estis embuskintaj en la unuaj vicoj. Nun ni estas elirintaj antaŭ la brankardo-portantoj, kaj alvenis ĉi tien nur por antaŭanonci al vi kaj peti ke vi sintenu kiel bravulinon.

La ege trista patrino prenis alian maton kaj sternis ĝin ĉe la alia flanko de la kameno por prepari lokon al sia filo mallongviva. Ŝi elmetis el la kestego la nigran kaptukon kiun oni uzas okaze de mortosolenajoj kaj eliris eksteren por ekvidi la virojn revenantajn de la batalejo kun brankardoj surŝultre. Du el ili devojiĝis ĉe Palaj-kvartalo.

Kiam ili eniris en la malvastan padon kiu kondukis al ŝia hejmo, ŝi eliris renkonte kaj aldiris:

- Aŭskultu min, vi filoj de Shosh, aŭskultu mian parolon: Tie, interne, estas kuŝanta vundita soldato, kiun mi ne konas nek scias, sed mi postulas de vi ke neniu minacu lin, nek parolu malbonan vorton, ĉar mi ne kapablas toleri ambaŭ: morton kaj honton.

Poste ŝi gvidis ilin al la hejmo por ke ili kuŝigu ŝian filon ĉe la alia flanko de la kameno.

- Nur unu kozon la patrino volas scii: kiuloke estas la vundo de mia filo?

- Guste en la koro - diris ili.

Ŝi malkovris la bruston plenigitan per sango, fermis denove la surtuton, kisis la filon surfrunte kaj surokule, poste ekstaris kaj ekviŝis la larmoplenajn okulojn per randeto de la nigra kaptuko kaj diris:

-Eksidu, viroj, kaj trinku glaseton da brando. Ĉu probable kelkiu el vi konas la lingvaĵon nasxke⁹ kaj povas paroli kun tiu ĉi gasto enirinta nian hejmon?

Dum la viroj ektrinkis brandon kuraĝigante la patrinojn, sin anoncis maljuna viro kiu iam estis rifuĝinta en Montenegro kaj tie eklernis nasxke-n. Sofia parolis:

- Aŭskultu, vi fremda junulo: Ne suspektu, nek timu ĝis vi loĝos en ĉi tiu domo, ĉar nenio malbona okazos al vi. Patrino klopodos por vi samkiel por siaj hejmuloj kaj ne zorgu nek enuu pro nia malriĉeco, ĝis vi resaniĝos. Kiam vi bone resaniĝos, ni kondukos vin ĝis via lando. De kie vi estas?

- De Kolaŝino, de Montenegro.

- Ĉu via patrino vivas?

- Jes, ŝi estas samaĝa kiel vi, mi havas ankaŭ la patron kaj du fratinojn, mi estas edzigita kaj nun ekspektas infanon. Ekde dek tagoj ni

alvenis ĉi tien por militi, nur Dio scias kio okazas en mia hejmo. Sed aŭskultu, vi nobla virino: kiom mi komprenas, tiu ĉi mortigita junulo estas via filo. Li povas esti mortigita ankaŭ de mia fusilo, kiu se ne mortigis lin estas mortiginta kelkaj aliaj kaj estas sekiginta multajn patrinajn korojn. Mi ja ne ekspektis tiom da nobleco de vi! De vi mi ekspektis nur morton, ĉar por tio ni alvenis ĉi tien. Multan dankon al vi pro la noblaj vortoj kiujn vi eldiris antaŭ ĉi tiuj viroj kaj kiujn mi kredas. Tamen, kiel eblas ke mi manĝu panon el la manoj de tiu kies filon mi jam mortigis? Ne nur hodiaŭ, sed ĉiutage mia vizaĝo plurestos mortiganta vian koron! Pensu ke ankaŭ mi sentas kiel homo.

- Aŭskultu, filo de Kolaŝin: mia filo kaj vi neniam vidis unu la alian, nek konis unu la alian; neniam vi interkverelis, malamikiĝis kaj havis ian problemon inter vi; via fusilo ne estas la via, sed alies. Neniam mi volas ke sekiĝu la koro de via patrino samkiel la mia!

Antaŭ ol mallumiĝis la tuta loĝantaro foririnta en la grotojn kaj arbarinterenojn revenis kun la brutaro en siajn hejmojn, ĉar oni anoncis ke sxkjau kapitulaciis. Oni dissendis ankaŭ la nigran mortosciĝon: tri personoj en tiu kvartalo de Palaj kaj Ndreĝijnaj, du en Dardhe kaj Ĉilkok. Alvenis la virinoj vestitaj nigre por viziti kaj plori, la viroj por kondolenci kaj kuraĝigi kaj por entrepreni taskojn rilate la entombigon. La filon de Sofi oni eligis eksteren por lavi kaj vesti per novaj vestaĵoj. Nur tiam la patrino embarasiĝis, ĉar la tolaĵojn de sia filo ŝi ja estis uzinta por la vundita soldato. Sed oni petis novajn alihejme. Post kiam oni surmetis la tirqo-n¹⁰ kaj ruĝan xhamadan-on¹¹ la filon oni revenigis hejmen sur la bela kuŝejo. Pjeter kiu posedis nasxke-n estis hejmmamiko de Sofi, tial li plurestis hejme. Ĝis malfrue nokte, la homoj venadis kaj iradis, preparante la solenaĵojn de la entombigo, kelkiu tro laca ekdormis. Ankaŭ Pjeter Bala estis okupinte gasteĉambran anguleton, dum la mortinto restis sole sen gardanto dum certa tempo. Dume, la sxkjau, vidante neniun ĉirkaŭe, ekstaris malrapide de sia kuŝejo, aliris al la mortinto, ekrigardis tiun ĉrman junulon, kiun li estis mortiginta mem kaj

ekploris:

"Ho, mia frato, filo de tiu nobla patrino, kial do ni frapis unu la alian. Pli bone estus tion fari kontraŭ niajn reĝojn!"

Kaj li estis kovrinta lin ploregante, tiom ke la ripozantoj vekigis. Klopodante ekstaris, li revundis grave sian vundon en la gambo, tiom ke li ne povis plu stari surpiede sed ekfalas surteren kaj la vundo eksangis. Pjeter Bala kaj du aliaj viroj portis lin kaj remetis en lian kuŝejon, kaj dezirante ŝanĝi la bandaĝojn sangumitajn petis al Sofi novan tolaĵon. Sofi prenis la sangumitajn bandaĝojn de sxkjau kaj enmetis ilin en la saman lokon kie ŝi havis la ĉemizon de sia filo. Eble ankoraŭ hodiaŭ ili pluestas tie. Post ses semajnoj la junulo resaniĝis, Sofi trovis por li gvidiston kaj kondukis lin sane ĝis Kolaŝin de Montenegro.

- 1) **Shala** - montara regioneto norde de Albanio, loĝata de montaranoj kiuj eĉ dum otomana jugo ne subiĝis.
- 2) **Dukagjino** - vasta regiono en norda Albanio kaj Okcidenta Kosovo.
- 3) **Shkoder** - plej granda urbo norde de Albanio ĉe la landlimo kun Montenegro, iama ĉefurbo de iliraj reĝlandoj.
- 4) **Prekal** - montara regioneto en Albanio ĉe la landlimo kun Montenegro.
- 5) **Zano** - feino el la albana popola mitologio; eposo pri bravuloj.
- 6) **sanga herbaĵo** - popola medikamento por haltigi sangadon, ĉerpita el herbaĵoj.
- 7) **probatino** - intima amiko kun kiu albano kuntrinkis reciproke siajn sangerojn.
- 8) **sxjau** - **sxkjau** - albana nomo por slavo, pli precize por serboj.
- 9) **nasxke** - lingvaĵo de serboj-montenegranoj.
- 10) **tirq** - albana popolokostuma pantalono el lano.
- 11) **xhamadan** - albana popolokostumo jako el lano ornamita per oraj fadenoj.

El la albana tradukis: **Bardhyl Selimi**

PIRAMIDOJ EN BOSNIO! ĈU?

 Smail Grbo

Vojaĝantaj tra Visoko, la urbo 30 km norde de Sarajevo (Bosnio kaj Hercegovino), jam el buso aŭ trajno videblas la monto nomata Visočica (*visoka* signifas *alta*) kiu okulfrape similas piramidon. Sed nur kiam ĉapelhava junulo, sinjoro magistro Semir Osmanagić - Sam, Bosniano el Usono, esploristo, mondvojaĝisto, publicisto, humanisto, firmaoposedanto en Hjustono, surgrimpis antaŭ kvar jaroj kun la loka muzeestro Senad Hodović la monton Visočica, kaj vidis antaŭ si ankoraŭ 2-3

piramidsimilajn montojn (kio memorigis lin al la situacio en la meksika lando Pueblo), li ekscite diris: "Ĉi tio estas piramido! Tio estas valo de piramidoj! Unikaj, nuraj piramidoj en Eŭropo!" Kaj li komencis provelfosi, organizis satelitan fotadon, venigis diversfakulojn ... kaj la hipotezo preskaŭ fariĝis realaĵo. Oni ricevis oficialajn permesojn kaj iom da subteno, organizis teamon de diversaj kompetentaj fakuloj, fondis Fondadojn "Arkeologia parko: Bosna piramido de Suno, Sarajevo", kaj post subtenoj (sed



ankaŭ malsubtenoj, duboj kaj neoj flanke de kelkaj bosnihercegovinaj respondeculoj kaj "fakuloj", post la unuaj kuraĝigaj rezultoj estas antaŭ nelonge organizita la Unua internacia scienckonferenco "Bosna piramidvalo".

La konferencon partoprenis diversfakaj sciencistoj kaj piramidfakuloj el Egiptio, Rusio, Britio, Ĉinio, Kroatio, Bosnio, Hungario, Pollando, Bulgario... Okazis dufojaj ekskursoj al la piramidoj de Suno kaj Luno, al la subteraj kelkdek kilometraj tuneloj sub la tuta Piramidvalo, al la subtera templo Vratnice kaj la tuttaga vizito al Arkeologia parko "Bosnaj ŝtonaj globoj" ĉe Zavidovići. Poste okazis prelegoj, projekcioj, diskutoj, konkludoj...

Kaj, jen kion diras aliuloj. La urbanoj de Visoko, kiuj iam uzadis jam pretajn ŝtonojn por konstrui siajn domojn aŭ murzonojn, nun diras: "Centprocente ekzistas piramidoj!" (Ili esperas kaj jam provas profiti de turismo, faras suvenirojn, rakontas ŝercojn, kantas popolkantojn pri siaj piramidoj – de la Suno, de la Luno, de la Amo, Piramido de bosna drako, Templo de la terglobo.) Sarajevanoj ĉefe kredas je la piramidekzisto. Iuj diras: "Io arkeologie grava certe ekzistas. Hercegovino havas Madonon (en Medugorje), Bosnio piramidojn (en Visoko)." Aliaj dubas: "Eble ekzistas, eble ne". Kaj la fakuloj? D-ro Nabil Mohamed Swelim, arkeologo kaj egiptologo, triobla doktoro pri sciencoj, prezidinto de la Konferenco: "Ĉi tie ni havas piramidojn, kiuj certe estas farajo de homaj manoj. En Visoko estas la plej granda piramido en la mondo, pli alta ol la Keopso, kiu havas grandan signifon por la tuta homaro." Lia kolego, d-ro Soliman Hamed, profesoro pri arkeologio ĉe Universitato en Kairo: "En la estonteco Bosnion kaj Hercegovinon ni nomos 'Lando de piramidoj". Optimistoj estas ankaŭ d-ro A. A. Barakat (Egiptio), d-ro Ivan Ŝimatović (Kroatio) kaj multaj aliaj. Prof d-ro Vlatko Določek en sia recenzo por la 9-a libro de Semir Osmanagić "Bosna piramidvalo" (Sarajevo, 2006), parafrazante la eldiron de Neil Armstrong sur la Luno en 1969 diras, ke s-ro Semir Osmanagić, se oni konfirmos lian hipotezon pri la ekzisto de la Piramidvalo en Visoko, povos diri: "Ĉi tio estas malgranda paŝo en mia esplorista praktiko, sed granda por nia historio!" Mi aldonu: por historio de Bosnio, de Eŭropo, de la mondo. Kaj Semir mem diras: "Montriĝos ke Bosnio kaj Hercegovino estas unu el naskiĝejoj de la homa civilizo. Kaj en la tunelo al la Piramido de la Suno, 2,5 km longa, troviĝas eble la unua eŭropeca skribaĵo." (Unu el liaj libroj titoliĝas: "Civilizo Antaŭ la Komenco de la Oficiala Historio".) "Pra-alfabeto el Visoko" sur ŝtonoj en tuneloj, 20 metroj profundaj, estas multe pli malnova ol la skribaĵoj en Glozel (Francio), diras fakuloj.

Vere, jam videblas multaj "artefaktoj" kaj pruvoj pri kiuj, pro la vasteco de la temo, ni ne povas skribi. Ni menciuj ke en Visoko estis sidejo de mezepokaj bosnaj reĝoj, el kiuj la plej konata

kaj amata estas Kulin-ban. Estas ideo pri fondo de terglobo (tutmonda) centro por la studado pri piramidoj kun la sidejo en Sarajevo. Kaj la dua Konferenco okazos post du jaroj, kiam espereble videblos novaj pruvoj. Per pli granda helpo la grandega laboro povus pli rapide progresi.

Iuj vidis Madonon. Kaj religia turismo evoluis. Sinjoro Semir Osmanagić (kaj multaj aliaj) vidas kaj montras piramidojn. Kaj la arkeologia turismo prosperas. Jam venis homoj el 80 landoj. Inter ili ankaŭ la partoprenintoj de la sarajeva IJK. Nevenipovaj povas konsulti: www.piramidasunba.ba aŭ kontakti la aŭtoron de ĉi tiu teksto: Smail Grbo, Vrbovska 60, BA-71000 Sarajevo, Bosnio kaj Hercegovino; smailo@bih.net.ba

**INTERNACIA ESPERANTO-KONFERENC
KONDOROS, HUNGARIO, 18-24jul09**

HUMURA LITERATURO EN ESPERANTO



Informoj, aliĝoj

Eric LAUBACHER, 1 rue Bougainville,
(FR) 78180 MONTIGNY-Bx, Francio
tel. +33 1 30 96 67 91 rete: kasisto@osiek.org

Pál KOZSUCH, Vasút u. 3,
(HU) 5553 KONDOROS, Hungario
rete: pauljuno@freemail.hu

OSIEK: <http://osiek.org>



Ivan Pleadin
kaj arhivo
de "Grafokom"

LEGENDA O PICOKIMA®



Srdačan pozdrav iz Đurđevca




"Legenda o Picokima" (Legendo pri Kokoj), kelkfoje nomata ankaŭ "Picokijada", estas la urba kulture-turisma manifestacio en Đurđevac, en la nordokcidenta parto de Kroatio, okazanta ĉiujare la lastan semajnfino de junio. Pasintjare ĝi festis la 40-an datrevenon (la unuan fojon ĝi okazis en 1968).

La festo rememorigas pri Ulama-bejo, gvidanto de turka soldataro kiu sensukcese sieĝis la urbon. Kiam en la urbo ekmankis nutraĵoj, la defendantoj metis la lastan kokon (en la loka dialekto "picok" signifas "koko") en la kanontubon kaj elpafis ĝin al la turka tendaro. Surprizita, Ulama-bejo ekpensis ke la defendantoj estas sataj kaj primokas lin kaj lian soldataron, kaj la turkoj forlasis la urbon ne konkerinte ĝin. Dum ĉiujara festo ĉirkaŭ la fortikaĵo sieĝita de la turkoj, revivigas scenoj el turkaj bataloj kun multaj piroteknikaĵoj, kaj la teatraĵo en la subĉiela scenejo estas la ĉefa programero de la manifestacio, certe vidinda. La popola teatra ludo kun multaj aktoroj kaj statistikoj, ĉevalrajdantoj, sonaj kaj lumaj efektoj, troviĝas sub preventiva protekto de la Ministerio pri kulturo de Respubliko Kroatio kiel la unua nemateria kulturvaloraĵo de Kroatio. La legendo parolas pri braveco kaj sagado de la loĝantoj de Đurđevac, fieraj pro sia historio, pro sia kromnomo kaj pro sia koko, kiu fariĝis hodiaŭ la plej ofte uzata heraldika simbolo de ĉi tiu regiono.

En 2008, okaze de sia 40-jariĝo, la manifestacio estis elektita kroatia reprezentanto en la internacia konkurso "Eŭropa celloko de bonkvalito".

Ĉi-jare, Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj gvidos vin al unutaga ekskurso, riĉprograma kaj neĉiutaga travivaĵo en la urbo de Kokoj. Se vi volas kunvojaĝi, interesigu rekte ĉe zagreba.esperantisto@gmail.com





MEDVEDGRAD

Radenko Milošević

Medvedgrad, la renovigita fortikaĵo videbla sur unu pinto de la apudzagreba monto Medvednica, havas elstaran rolon en la kroata kaj zagreba historio, kaj en la kroata Esperanto-erao. Multaj eventoj okazis en kaj apud tiu forikaĵo, kaj ĝi estas aparte menciita en la unua libro tradukita el la kroata en Esperanton el la jaro 1911. La romano "La trezoro de l' orajĵisto" de August Ŝenoa, la "plej zagreba verkisto" sur la paĝoj 13 kaj 14 pri



Medvedgrad parolas jene:

"Meze de monta selo super la gracia pinto sin reflektas de l' ombro de centjaraj kverkoj la blanka fasado de malnova Medvedgrad, staranta meze de bukeda parko. Ĝiajn malnovajn mallumetajn muregojn blankigis antaŭ ne longe la reĝa arkitekturo: Girolamo Arkonati. Sur malsutilaj bastionoj briletas brilaj ĉapeloj kvazaŭ oraj pomoj en fein-ĝardeno, kaj sur altaj fenestroj ludas la radioj de la somera suno."

La malnova kastelo kaj fortikaĵo estis konstruita, je la instigo de la papo Inocento la Kvara, en la 13-a jarcento (1249-1254), post la invado de mongoloj en la jaro 1242. Ĝi estis la jaro en kiu la kroat-hungara reĝo Bela la Kvara atribuis "La oran buleon" al Zagrebo. Ĝi estas elstara anakŭ ĉar en ĝi mortis la 30-an de novembro 1472 Ivan Ĉesmiĉki (alinome: Jannus Panonnius), kroata humanisot, sciencisto, latinlingva poeto, diplomato kaj episkopo. La citadelo Medvedgrad estas ankaŭ la loko kie estis konstruita la "Altaro de Hejmlando" dediĉita al la falitaj soldatoj en la Hejmlanda milito (1991-1994).

AŬTOŜOSEO BUDAPEŜTO-ZAGREBO- RIJEKA

Radenko Milošević

Kiel rapide forflugas jaroj! Cen kvardek jarojn post la aneksado de la t.n. "Flikaĵo de Rijeka", papereto algluita super la originala Kroata-hungara kontrakto el 1868, en 2008 estis finkonstruita komuna hungara-kroata aŭtoŝoseo de la hungara ĉefurbo Budapeŝto ĝis la adriatika havenurbo Rijeka. La lasta parto de la transeŭropa trafika koridoro E65 de Budapeŝto al Rijeka, estis malfermita la 22-an de oktobro pasintjare.

Mallonga historia retrorigardo respegulas la rapidegan ŝanĝon en la rilatoj inter la du popoloj kaj ŝtatoj. La falsigitan kontrakton el la jaro 1868 kaj la disfalon de Aŭstri-Hungario en la jaro 1918, sekvis la malsevere kontorlata ŝtatlimo kaj helpo de Hungario al kroatoj dum la Patrolanda milito post 1991.

La urbon kaj havenon Rijeka kun ĝia ĉkauaĵo multaj volis alproprigi. Ĝi havis dum jarcentoj specialajn historion kaj sorton kaj estis la centro de la evoluo de la glagolica skribo. La unuan fojon Rijeka ricevis sian aŭtonomion en la jaro 1719 iĝinta libera haveno per la decido de la aŭstra caro kaj de la kroata reĝo Karolo la Kvara. Dum la tempo de la imperiestrino Maria Theresia, kiu fariĝis per "pragmatika sankcio" de la kroata Parlamento reĝino de Kroatio, estis fondita "corpus separatum" kaj ĝis la jaro 1924 Rijeka estis pli-malpli memstara,



havante ŝtatajn elementojn. Tian pozicion Rijeka perdis dum la regado de banuso Jelačić en 1848, sed denove ĝi fariĝis "corpus separatum" en 1868. En la tempo de Aŭstri-Hungara imperio la politika kaj administracia stato de Rijeka estis tre suspektinda, ĉar la papereto algluita sur la originalo de "Kroata-Hungara kontrakto" el la jaro 1868 nomita "Flikaĵo de Rijeka" fariĝis aldona artikolo 66, kio kaŭzis rektan hungaran administradon kaj hungarigon de Rijeka kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Post la disfalo de Aŭstri-Hungara Imperio, en 1918, la urbo-haveno kaj la kroata loĝantaro ĝisvivis ankoraŭ pli pezan sorton en la unua kaj dua Jugoslavioj.

LA KROATLINGVA TRADUKO DE LA VERKO DE IGNJAT ĐURĐEVIĆ

Radenko Milošević

En Dubrovnik estis la 10-an de novembro 2008 prezentita kroatlingva traduko de la libro "Sankta Paŭlo apostolo Ŝippereulo" de la dubrovniko verkisto Ignjat Đurđević. La originalo estis skribita en la latina lingvo en la jaro 1730, kaj la originalon tradukis en la kroatan lingvon kroata esperantisto d-ro Jozo Marević, la elstara klasika filologo. La nekonata 360-paĝa verko de Đurđević havis antaŭ 280 jatoj grandegan reehon en Eŭropo.

La publikigo de la libro en ĝia kroata traduko okazis enkadre de la pasintjare proklamita "Jubilea jaro de Sankta Paŭlo" kaj ĝi estis la enkonduko en la kvartagan sciencan simpozion "Ignjat Đurđević kaj la sanktpaŭla ŝippere en la akvospatco de la insulo Mljet", kiu okazis en Dubrovnik kaj Mljet.

Estas klarigendaj detaloj kial tiu verko de Đurđević estas tiom konsiderinda. La Maltaj kavaliroj loĝigis en la jaro 1530 la insulon Malto kaj ili transprenis ĉiujn indikojn ligitajn kun la

ŝipperejo de Sankta Paŭlo ĉe la kroata insulo Mljet kaj ligis ilin kun Malto. Tion speciale ebligis la cirkonstanco, ke por la ambaŭ insuloj en la latina lingvo oni uzis la saman nomon – Melita. Đurđević malkovris tiun trompon kaj decidis skribi sian verkon, sed kontraŭstari al la Maltaj kavaliroj, en la tempo kiam Eŭropo luktis kontraŭ turkoj, estis preskaŭ neebla. La pruvo, ke Sankta Paŭlo ne estis sur Malto sed sur Mljet, troviĝas en la 27-a kaj 28-a ĉapitroj de la Agoj de la Apostoloj. Kiel atesto por tia aserto sufiĉas ankaŭ la kernaj vortoj en la Evangelio laŭ sankta Luko. En "La Sankta Biblio" legeblas: "Sed kiam venis la dek-kvara nokto, kaj ni estis ĉirkaŭpelataj en la Adria maro, la maristoj eksentis ĉirkaŭ noktomezo, ke ili alproksimiĝas al ia lando" (La Agoj 27,27) "Kaj kiam ni saviĝis, tiam ni sciigis, ke la insulo estas nomata Melita" (La Agoj 28,1) (La citaĵoj laŭ la traduko de "La Sankta Biblio", Londono, 1931, de L.L.Zamnehof).

Iom post iom la verko estis neglektita ankaŭ en la kroata popolo malgraŭ certatempa internaciigo de la problemoj en Eŭropo rilate tiun ĉi verkon. Per la traduko de la verko farita de la kroata esperantisto d-ro Marević, oni staras ĉe la komenco de la korektado de la maljustaĵo farita al Dubrovnik kaj ĝiaj kulturo kaj tradicio.



Ignjat Đurđević kaj lia libro el 1730



KONTRIBUO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ AL ORIGINALA KAJ TRADUKA LITERATURO EN ESPERANTO

Josip Pleadin

Antaŭ ol paroli pri kontribuo de kroataj esperantistoj al kampo de literaturo originala kaj traduka, oni konsciu pri kelkaj faktoj:

1) Kroatio en la tempo de apero de Esperanto estis parto de Aŭstri-hungara imperio. Post la unua mondmilito (1919), ĝi fariĝis parto de Jugoslavio, kaj ekde 1991, ĝi estas sendependa ŝtato.

2. En la teritorio de nuntempa Kroatio vivis ne ekskluzive kroatoj, sed grandparte ankaŭ serboj, do estus pli oportune paroli pri kontribuo de "kroataj" esperantistoj, ĉar iuj gravaj aŭtoroj ne estis laŭnacie kroatoj.

3. Kelkaj regionoj nuntempe ne apartenantaj al Kroatio, iam estis konsistigaj partoj de kroata nacia spaco, kaj ankaŭ tie okazis gravaj literaturaj eventoj el la Esperanta historio.

La unuaj esperantistoj en la teritorio de la nuntempa Kroatio aperis jam en 1889 en Osijek, sed la ĉefaj aktivecoj grandskale, post apero kaj baldaŭa malapero de Adriatika Ligo Esperantista en Rijeka (1907), fakte okazis precize antaŭ 100 jaroj. En 1908 en la kroata ĉefurbo Zagrebo, post multaj klopodoj, fondiĝis Unuiĝo de Kroataj Esperantistoj (UKE), kiu havis fortan tutlandan influon. Guste la fondintoj kaj membroj de tiu organizaĵo, devas esti konsiderataj la unuaj kontribuintoj al literaturo de Esperanto. Tia konstato estas natura, ĉar pri pli fruaj originalaj verkoj aŭ tradukoj ni ne scias, pro neekzisto de skribitaj kaj presitaj pruvoj.

Per la fondiĝo de UKE komencis aperi en 1909 la unua kroata Esperanto-gazeto titolita "Kroata Esperantisto", kiu havis

mallongan vivon kaj malaperis en 1911, sed ĝiaj paĝoj montras al ni abundon da interesa historia kaj literatura materialo. Sen tiu gazeto ne eblus rekonstrui la enlandan Esperanto-historion kaj des malpli la kontribuon al literatura kampo.

La fondintoj kaj gvidantoj de UKE estis Mavro Spicer kaj Danica Bedeković. **Mavro Spicer** estis literature tre talenta persono, kiu verkis kaj tradukis en kvar lingvoj (kroata, germana, hungara kaj Esperanto), kaj li povas esti konsiderita la unua tradukisto el la kroata Esperanten, ĉar la unua poezia traduko estis ĝuste lia traduko de "Mia ŝipo" de Petar Preradović, aperinta en la unua paĝo de la unua numero de "Kroata Esperantisto". Ankaŭ en postaj numeroj de la sama gazeto aperadis liaj poeziaj tradukoj, kaj fine en 1912 aperis ankaŭ la unua poezia antologio "Kroataj poeziaroj" kun literaturhistoria enkonduko, kiu parte konsistis akaŭ el la tradukoj aperintaj en "Kroata Esperantisto". Tiun antologion aparte laŭde taksis "Lingvo Internacia" en Parizo (1922, paĝo 417). Estas konata la fakto, ke en 1930-aj jaroj Spicer havis pretan multe pli ampleksan poezian antologion tradukitan el la kroata al Esperanto, sed la manuskripto post lia morto en 1936 perdiĝis. **Danica Bedeković**, la kunfondintino de UKE estis malpli sperta tradukisto, sed ŝi kune kun **Ivan Stalzer** (iama membro de Adriatika Ligo Esperantista en Rijeka, kaj poste membro de UKE) kuntradukis partojn de la faman eposon "La morto de Samail-agao Ĉengijic" de kroata banuso Ivan Mažuranić. La tradukon forte kritikis Mavro Spicer, kiu estis sperta literaturisto kaj tradukisto, kaj kiu mem faris tradukon de la

kompleta eposo aperinta en 1933 ĉe fama Esperanto-presisto Vilim Buk en Slavonski Brod, konata kiel eldonisto de "La Suda Stelo", unu el la plej imponaj Esperanto-gazetoj iam ajn eldonitaj en Kroatio.

En la jaro 1909 aperis ankaŭ "Printempo" la unua originala poemo de Spicer en "Kroata Esperantisto" (n-ro 3), kaj samjare la unua originala poemo de Danica Bedeković titolita "Al nia karega Majstro" (n-ro 9-10). En "Kroata Esperantisto" debutis ankaŭ **Slavoljub Ježić**, poste fama kroata slavisto kaj latinidisto, per siaj tradukoj kaj unu originala poemo titolita "Se ci sciuss...". Al tiu literatura grupo certe apartenas ankaŭ **Fran Kolar - Krom**, fondinto de la dua plej grava kroata Esperanto-societo en Bjelovar (1911), sed multe pli grava pro sia traduko de romano "La trezoro de l'orajisto" de August Ŝenoa, aperinta en 1911 en Zagrebo. Tiu traduko estas konsiderata kiel la unua proza traduko el la kroata literaturo al Esperanto. Nesufiĉe konatas la fakto, ke tiun tradukon antaŭ la publikigo legis Kabe, kiu kuraĝigis la tradukinton aperigi la verkon. Kiel tradukisto en la frua periodo de Esperanto en Kroatio aperis ankaŭ **Antonija Jožičić**, kies traduka aktiveco aparte akcentiĝis per traduko de "Konfeso" de Milka Pogačić en 1913. La antaŭparolon por tiu verko skribis Mavro Spicer, kiu havis longan kaj fruktodonan kunlaboron kaj korespondadon kun la tradukintino. La traduko de Antonija Jožičić, laŭ la lastaj esploroj, estis la unua Esperanta verko pere de kiu estis farita ĉina traduko de iu kroata literaturaĵo, kaj la unua kroata literaturaĵo iam ajn tradukita en la ĉinan. Mavro Spicer estis kunlaboranto ankaŭ de "La Revuo" en Parizo, kie aperadis liaj literaturaj kaj



literatur-historiaj skizoj. En tiu revuo aperis ankaŭ felietono de alia kroata esperantisto **Metodio Brajša**, kiu en la marta numero de 1909 verkis artikolon pri kroata poeto "Silvio Strahimiro Kranjčević". Nesufiĉe konata estas ankaŭ **Stanislav Tomić**, kiu en 1919 aperigis libreton "Du sudslavaj popolfabeloj", fakte rerakontitajn fabelojn, kio povas esti konsiderata ankaŭ kiel iaspeca originalaĵo. Stanislav Tomić cetere, post aktivado en UKE, migris al Suda Ameriko kaj lia filo Anton Tomić - Mach estis pionira Esperanto-aganto en Kolombio. En la periodo antaŭ kaj dum la unua mondmilito gravas mencii ankaŭ la modestan revueton "La Zemuna Esperantisto", eldonita en vilaĝo Karlović apud Zemun (nuntempe Serbio, tiutempe Kroatio) redaktitan de **Jakobo Schneider** (1912-1914). En ĝi aperadis ĉefe tradukoj, interalie el la kroata kaj serba literaturoj.

Kiel daŭriganto de UKE, en 1919 en Zagrebo estis fondita Zagreba Esperantista Societo, kies ĉefa motoro estis Dušan Maruzzi. ZES eldonis unue la tre modestan gazeton "La Provo", en kiu tamen aperadis literaturaj originalaĵoj kaj tradukoj. Kiam la gazeto ŝanĝis sian titolon al "Konkordo" kaj fariĝis tipografie pli alloga, ankaŭ literaturaj originalaj kaj tradukaj plioftiĝis. Tiun fakton oni povas danki verŝajne al forta influo de **Nikolao Hohlov** (=pseŭdonime: Skito), kiu estis unu el la ĉefaj stabanoj kaj kunlaborantoj de "Konkordo", ĉar tiutempe li vivis en Zagrebo. Tiutempe li verkis en Zagrebo ankaŭ sian faman originalan poemaron "La tajdo" (Heroldo de Esperanto, 1928) kaj teatraĵon "La morto de la delegito de UEA" kaj faris plurajn tradukojn ankaŭ el la kroata (ekzemple de la poemoj de Dragutin Domjanić). Aliaj literaturaj kunlaborantoj de "Konkordo" estis: **S. Balkanano** (=Stevan Zivanović) kaj ruso **Mihail Solovjev** vivinta en Novi Sad (Serbio) kaj poste en Cavtat (Kroatio), per siaj originalaj poemoj kaj prozaĵoj, **Ivo Rotkvić** per tradukoj, **Fran Janjić** per tradukoj, **Rudolf**

Signal el Daruvar per poeziaj tradukoj, **Jakobo Schneider** per originalaj poemoj kaj prozaĵoj, **Niko Bubalo** per traduko de poemoj (ekz. de konata popola balado "Hasanaginica"), **Jelena Manojlović** per traduko de "Vintra nokto" de Milan Ogrizović, **Stijepo Ferri** per poeziaj tradukoj, **Mavro Spicer** per tradukoj poeziaj kaj aliaj. Kiam en decembro 1929 ekmutis "Konkordo", Ivo Rotkvić entreprenis en Bulgario eldonadon de "Balkana Konkordo", kiu havis ankaŭ fortan literaturan karakteron, sed mallongan vivon. Ĝiaj ĉefaj kroataj kunlaborantoj estis ĝuste Rotkvić (sub la pseŭdonimo **Jean d' Agréve**) per tradukoj kaj **Franjo Homar**. El la literatura grupo kolektita ĉirkaŭ "Konkordo" kaj "Balkana Konkordo" ĉiuj plimalpli konstante agadis literature. **Fran Janjić** fariĝis per traduko de "Ano de l' ringludo" de Dinko Šimunović, kiu pere de lia traduko aperis ankaŭ en la ĉina, kaj per aliaj poeziaj tradukoj. **Niko Bubalo** bedaŭrinde mortis tre frue, sed li evidente estis tre bona poeto kaj vortaristo, kiu sian famon ricevis per tradukoj de Zamenhofaj poemoj kroatlingven. Bedaŭrinde, la manuskripto de lia granda vortaro perdiĝis ĉe la redakcio de "Konkordo". **Ivo Rotkvić** fariĝis unu el la plej bonaj tradukaj stilistoj de Esperanto kaj membro de ĝiaj Lingva Komitato kaj Akademio, kies tradukoj de "Cezaro" (de Mirko Jelušić) en 1934 kaj de "Tragedio en la Universo" (1961) fariĝis ekzemploj de bonstila tradukado, sen naciaj influoj. Li mem estis unu el la plej bonaj oratoroj de Esperantujo. **Franjo Homar** estis la unua redaktoro de "La Suda Stelo" (aperinta en 1932 en Slavonski Brod), ĝis sia tro frua morto, sed li lasis nemultajn sed interesajn originalajn kaj tradukajn verkojn.

Sendiskute talenta estis ankaŭ **Stevan Zivanović**, serbo naskiĝinta en Nova Gradiška (Kroatio), kiu mortis apenaŭ 38-jara, sed sukcesis lasi post si multajn spurojn en verka, vortarista kaj organiza kampoj. Li estis escepte fruktodona originala verkisto, kiu postlasis amason

da poemoj en diversaj gazetoj. Libroforme aperis liaj prozverkoj "Tra mizero de la vivo" (1922), "Bela kaj Stela" (1925) kaj "La diino de la maro" (1926). Lia ĉefverko estas la romano "La sonorilo de Bled", kiu aperis nur dudek jarojn post lia morto en 1959 en Beograd (Serbio).

Per sia apero, la gazeto "La Suda Stelo" daŭrigis ankaŭ literaturan vojon de "Konkordo", sed la ĉefroluloj estis iomete ŝanĝitaj. Aperis novaj nomoj, kiuj ne estis ekskluzive literaturistoj, sed aktivis ankaŭ en tiu kampo. Komence informa kun literaturaj tekstoj, "La Suda Stelo" en la periodo de 1960-aj jaroj estis ĉefe literatura kaj socikultura, kaj certatempe kunfandiĝis kun la japana literatura revuo "Prometeo". Ĝi aperadis ĝis 1973 kun kelkaj interrompoj, kaj ĉiam publikigis ankaŭ literaturajojn. El longa listo de ĝiaj kunlaborantoj literaturaj ni menciu en la tempo antaŭ la dua mondmilito: **Mavro Spicer** (originalaj poemoj), tradukoj poeziaj, **Stevan Zivanović** (originalaj poemoj), **Mihail Solovjev** (originalaj poemoj), **Franjo Homar** (originalaj poemoj kaj poeziaj tradukoj), **Andrija Mišak** (poeziaj tradukoj), **Josip Velebit** (poezio originala kaj traduka), **Marko Demetrović** (poeziaj tradukoj), **Josip Granda** (escepte fruktodona poezia tradukisto), **Franjo Slogar** (prozaj tradukoj), **Fran Janjić** (prozaj tradukoj), **Dušan Puhalo** (poeziaj tradukoj), **Božidar Vanĉik** (poeziaj tradukoj). En la unuaj jaroj post la dua mondmilito, al "La Suda Stelo" multege kontribuis literature: **Božidar Vanĉik** (poeziaj kaj prozaj tradukoj), kaj multe malpli **Emilija Lapenna** (literaturaj felietonoj, prozaj kaj poeziaj tradukoj), **Marinko Gjiwoje** (prozaj tradukoj), **Mirko Mamužić** (poeziaj tradukoj kaj originalaĵoj), **Josip Granda** (reproso de liaj tradukoj poeziaj, ĉar li estis viktimo de la milito), **Bo Zorović** (=Dalibor Brozović, poeziaj tradukoj kaj originalaj poemoj), **Ladislav Režek** (poeziaj tradukoj), **Zvonko Rehorić** (poeziaj tradukoj), **Josip Velebit** (poeziaj tradukoj kaj originalaĵoj), **Marko**

Demetrović (poeziaj tradukoj), **Zeljko Takač** (originalaj noveloj), **Ivica Šponar** (originalaj poemoj), **Ivo Borovečki** (poeziaj tradukoj). En la 1960-aj jaroj originalajn poemojn verkis **Stjepan Jakševac**, **Vesna Skaljcer-Race**, **Nedeljka Subotić**, **Damir Mikulić** kaj per tradukoj aperadis **Emilija Lapenna** (poezio, prozo, teatraĵoj kaj multaj recenzoj), **Zvonko Rehoric** (poezio), **Ivo Borovečki** (poezio), **Josip Velebit** (poezio), **Margareta Stoll** (svisino vivinta en Beograd, Serbio).

En 1961 aperis ĉe "Stafeto" la libreto "Reeĥoj - Jugoslavia poemaro", kiu mencias el Kroatio jenajn nomojn: **Antonija Albert**, **Franjo Homar**, **Duro Rašan**, **Tibor Sekelj**, **Vesna Skaljcer-Race**, **Nedeljka Subotić**, **Mavro Spicer**, **Božidar Vančik**, **Josip Velebit**, **Bo Zorović** kaj **Stevan Živanović**, do la ĉefan parton de tiu elektita antologieto konsistigas poemoj de kroataj esperantistoj. **Antonija Albert** estis kroatinino vivinta en Germanio, kaj sian famon ŝi atingis per gajno de premioj en Belartaj Konkursoj en 1958 kaj 1959. Ŝi estas reprezentita ankaŭ en "Esperanta Antologio". **Duro Rašan** estis konata nur pro kelkaj poemoj kiuj aperis unuafoje en "La Suda Stelo" kaj poste en la literatura gazeto "Koko" en 1990. Post lia morto estis trovitaj originalaj poemoj ĉe lia filino, kaj aperigitaj en 2007 en libreto "Dorno en la koro". **Tibor Sekelj**, kvankam nekroato, apartenas almenaŭ parte ankaŭ al zagreba literatura skolo. Li estas unu el la plej fruktodonaj kaj plej konataj originalaj kaj tradukaj verkistoj, multfoje premiitaj. Menciindas "Nepalo malfermas la pordon", "La trovita felico", "Tempesto super Akonkagvo", "Kumeŭaŭa - la filo de la ĝangalo" kaj "Premiitaj kaj aliaj noveloj", kvankam tio estas nur parta ĉerpajo el lia ampleksa verkaro. **Vesna Skaljcer-Race** kaj **Nedeljka Subotić** devenas el Kroatio, sed grandan parton de sia vivo ili travivis en Serbio. Tamen, ili estis originalaj verkistinoj kiujn kroatoj mencias

en siaj antologioj. **Vesna Skaljcer-Race** publikigis originalajn poemkolekton "Maristo surmaste" (1969) kaj prozajkolekton "El la vivo" (1977) kaj multajn literaturajojn originalajn en diversaj gazetoj kaj konkursoj. En la 1960-aj kaj 1970-aj jaroj certe la plej grandan rangon eksterlande havis **Josip Velebit** kaj **Božidar Vančik**, kiuj kunlaboris ekz. en "Norda Prismo", kaj kiuj estis ĉefe tradukistoj. Tamen, Velebit estis ankaŭ unu el la plej gravaj originalaj poetoj ne nur en kadro de Kroatio, sed li ne famiĝis pro tio, ĉar lia unua propra poemaro "Kanto de telegrafistoj" (1996) aperis nur post lia morto en Usono. Li estas konata pro multaj gravaj tradukoj, ekz. "Kanto al mia koro" (de Dragutin Tadijanović), "La morto de Smail-Agao Ĉengić" (eposo, 1972), "Makedonaj popolaj rakontoj" kaj romano "Ventoj" (el la makedona) ktp. Restis multaj liaj originalaj kaj tradukitaj verkoj ankoraŭ nepublikigitaj.

El la periodo antaŭ dua mondmilito restis nemenciita originala novelisto **Dragutin Wranka**, kiu pli konatas pro desegnado de primovadaĵaj karikaturoj, sed tamen lasis ankaŭ literaturan spuron en "Norda Prismo" verkante novelojn. El la 1960-aj jaroj menciindas kiel novelisto ankaŭ **Ante Ĝrgurina**, kies novelkolekto "Ĉe doktoro" aperis en 1958. Kiel escepto, **Emilija Lapenna** aktivis en teatra kampo, verkante originalajn kaj tradukante teatraĵojn. Ili aperis en "Teatro en Societo" (1956) kaj "Nova teatro" (1974). Ŝia plej grava teatraĵo estas "Lanĉo". **Ivo Lapenna** verkis ankaŭ originale, sed ĉefe fakajn librojn. Tamen, lia "Retoriko" apartenas al nepretarpeasblaj perloj de originala Esperanta literaturo.

La listo de literaturaj talentoj kaj aktivuloj ne estus kompleta sen **Roger Imbert**, franco, kiu edziĝis al kroatinino, kaj kiel membro de Studenta Esperanto-klubo en Zagrebo verkis originalajn satiraĵojn sub la pseŭdonimo Histriko. Tamen, lia plej granda kontribuo estas en traduka branĉo, ĉar li mem tradukis la tutan "Modernan

kroatian prozon", la plej ampleksan ĝisnunan prozan antologion tradukitan el la kroata. Tiu libro estis parto de la laboro de Internacia Kultura Servo en Zagrebo, kiu eldonis ankaŭ poezian antologion "Kroatia poezio" (1983), por kiu tradukis **Lucija Borčić**, **Ivo Borovečki**, **Dalibor Brozović**, **Predrag Āaković**, **Josip Granda**, **Zora Heide**, **Roger Imbert**, **Mirko Mamužić**, **Boriša Milićević**, **Nikola Rašić**, **Ladislav Režek**, **Ivo Rotkvić**, **Vesna Skaljcer-Race**, **Spomenka Štimec**, **Zlatko Tišljar**, **Božidar Vančik** kaj **Josip Velebit**. El tiu grupo da tradukistoj multajn nomojn ni konas jam de antaŭe, sed multaj aperis nur en 1980-aj jaroj. **Zora Heide** estas kroatinino kiu vivis en Danlando kaj Svedio, kaj tie komenciĝis kaj pleje evoluis ŝia literatura agado. Ŝi verkis prozaĵojn kaj poeziaĵojn kaj tradukis. Ŝi estis kunlaboranto de "Norda prismo", kaj aperis ŝiaj verkokolektoj sub la titoloj "Ni, homoj" (1970), "Ni komedietas" (1971), "Etulaj aventuroj", "Spuroj de l' doloro" kaj "Kantoj de l' silento" (1984). Ŝi multe kontribuis al diversaj literaturaj konkursoj. **Predrag Āaković** estis membro de SEK en Zagrebo, kaj viktimo de la Patrolanda milito en 1990-aj jaroj, sed tamen li lasis malgrandan spuron en traduka literaturo. **Boriša Milićević** estas serbo vivanta en Novi Sad, sed li multe tradukis ankaŭ el kroatia literaturo kaj verkis nemulte ankaŭ originale. **Nikola Rašić** tradukis okaze kaj nemulte, sed tamen tre kvalite. **Ladislav Režek** devenis el Kroatio, sed li vivis en Bosnio kaj Hercegovino, tradukante ĉefe poeziaĵojn. **Zlatko Tišljar** estis tradukinto de pluraj verkoj, sed ne ĉiuj aperis. El la aperintaj gravas la romano "Rande de l' prudento" de Miroslav Krleža.

La plej sukcesa el tiu grupo de originalaj literaturaj agantoj estas **Spomenka Štimec**, kiu famiĝis per sia unua originala romano "Ombro sur interna pejzaĝo" (1984), kaj ekde tiam aktive kaj multe verkas, speciale proze. Ŝi estis ankaŭ ĵuriano de Belartaj konkursoj de UEA samkiel Emilija Lapenna. Aliaj ŝiaj verkoj estas: "Geografio



de miaj memoroj” “Nesenditaj leteroj el Japanio”, “Kroata milita noktlibro”, “Aŭstralia pupo”, “Hodler en Mostar”, “Tilla” kaj aliaj. Ŝia ankaŭ verkis multe por diversaj periodaĵoj.

Lucija Borčić,

kvankam unu el la plej maljunaj kroataj esperantistoj, grandskale aperis kiel literaturisto nur en 1980-aj jaroj, sed ekde tiam ŝi faris enorman originalan kaj tradukan laboron, ĉefe poezian. Ŝiaj poemoj libroforme aperis en la kolekto “Pulsas la viv”. Ŝi estis en 1991 ankaŭ la ĉefa redaktinto de “Kroata Esperanta poemaro” kiu listigas ĉiujn pli-malpli konatajn originalajn verkistojn de Kroatio: **Antonija Albert, Lucija Borčić, Dalibor Brozović, Nikola Bubalo-Slavić, Zora Heide, Nikolao Hohlov, Franjo Homar, Roger Imbert, Slavko Ježić, Damir Mikuličić, Đuro Rašan, Tibor Sekelj, Zdravko Seleš, Vesna Skaljer-Rame, Mihail Solovjev, Antun Ŝimunić, Franjo Ŝlabek, Mavro Špicer, Ivica Sponar, Benjamin Tolić, Božidar Vancik kaj Josp Velebit.**

El tiu listo ni diris ankoraŭ nenion pri **Zdravko Seleš**, kiu estis redaktoro de sola literatura revuo en iama Jugoslavio, kiu aperadis en 1988-1990 sub la titolo “Koko”. Li mem verkis originalajn poemojn kiuj aperis en dulingva poemaro “Noćnik-Noktulo”, kaj iomete tradukis ambaŭdirekte. La revuo “Koko” publikigis multajn tradukojn kaj originalaĵojn de jenaj aŭtoroj: **Tibor Sekelj, Đuro Rašan, Spomenka Stimec, Zdravko Seleš, Josip Pleadin, Davor Klobučar, Lucija Borčić, Emilija Lapenna, Ivo Borovečki, Josip Velebit, Marko Petrović** kaj aliaj, sed ankaŭ lanĉis literaturan konkurson. Literaturan konkurson nomitan “Ivo Rotkvić” lanĉis ankaŭ Zagreba Esperanto-Ligo pere de sia periodaĵo “ZEL-ano”. ZEL aperigis ankaŭ serion “Etlibra biblioteko”, kie aperis modestaspektaj sed gravaj literaturaj kontribuoj. Unu el la ĉefaj estas publikigo de la poemaro “Ilia tosto je nia kosto” de **Marko Petrović**, interesa sed nekonata originala poeto, kiu

verkis satirtonajn poemojn, kiuj bedaŭrinde grandparte restis nepublikigitaj kaj la manuskriptoj post lia morto malaperis. La konkurso “Ivo Rotkvić” lanĉis ankaŭ originalan poeton **Nevenka Tomić**, kiu poste translokiĝis vivi al Makedonio kaj ofte tradukis poezion. Kiel parte originala parte traduka verkisto en 1980-aj jaroj aperis ankaŭ **Antun Ŝimunić** kaj **Slavko Ŝimunić** (poeziverkanto). Iomete originale verkis ankaŭ **Velimir Piškorec**, kiu en Belartaj konkursoj de 1987 ricevis honoran mencion por origiala prozo.

Se ne estas malmodeste menciitaj tion, ankaŭ la aŭtoro de tiu ĉi prezento okupigis pri literaturo, ĉefe pri tradukado de prozo kaj poezio, lastatempe aperigante ankaŭ originalajn rakontojn en la gazeto “Zagreba Esperantisto”. Lia ĉefa traduko estas “La kamaradaro de Petro Nodeto” de Mato Lovrak, kaj la ĉefa verko ĝenerale “Ordeno de Verda Plumo” (leksikono pri originalaj Esperanto-verkistoj en la mondo).

Originalan porinfanan prozon verkis ankaŭ **Zdravka Metz-Fleury**, kiu vivas en

Kanado, kaj traduke aktivis **Ivan Spoljarec** en Zagrebo.

Davor Klobučar

apartenas al juna generacio de promesplenaj tradukantoj, sed ankaŭ li komencis verki originale. Aperis libroforme lia originala vojaĝpriskribo “Sayonara, Japanio!”.

El novgeneraciaj talentoj menciindas la nomo de **Etel Zavadlav**, kiu nur antaŭ kelkaj jaroj komencis verki originale, ĉefe poeziaĵojn, sed ankaŭ prozajn mallongajn verkojn. Ŝi jam nun profiligis kiel matura verkanto, kvankam malofte ŝiaj verkoj aperas en presita formo. Ĉefe ŝi verkas en la interreta portalo ipernity, sed la multobla legado de ŝiaj verkoj en tiu portalo anoncas, ke ŝi povus baldaŭ fariĝi unu el la plej gravaj atutoj de Kroatio en la originala literaturkampoj.

Kvankam ĉi tiu prelego ne estas kompleta, kaj en ĝi certe mankas pluraj valoraj nomoj de originalaj kaj tradukaj verkantoj, ĝi sufiĉe konvinke montras, ke inter kroatoj la originala kaj traduka Esperanto-literaturo havas fortajn radikojn kaj grandajn sukcesojn.

LA PLEJ AĜA ESPERANTISTO EN KROATIO

Laŭ la informo ricevita de Vjekoslav Morankić el Rijeka, ni konsideras ke ĐURO KALACIĆ el Njivice sur insulo Krk, estas ĉi-momente la plej aĝa esperantisto en Kroatio: li havas 103 jarojn! Li naskiĝis en Konavle (Ĉilipi) la 26-an de decembro 1906. Laŭprofesie li estis aŭtomekanikisto. Li esperantistiĝis en Ĉilipi en la jaro 1924. Esperanton al li instruis Ivo Kirilanović. En 1930-aj jaroj li laboris en Fabriko de alkoholo en Zemun, kie ekde 1933 li estis membro de Esperanto-societo. En Zemun en la jaroj 1945-1954 lie stis taksisto, ŝoforo kaj fine aŭtomekanikisto. Tie al li daŭre instruis Esperanton la konata esperantisto Mehmed Jakupović. Al Zagrebo li translokiĝis en 1953, kaj al Njivice en 1973. Nuntempe li ne estas aktiva esperantisto, sed tamen li meritas niajn plenkrajn gratulojn!



 Russ Williams

RUSS WILLIAMS. Usonano el Aŭstino (Teksaso), eklerminta Esperanton en 2003. Nuntempe li loĝas kun sia esperantista pola fianĉino Anna Skudlarska en Vroclavo (Pollando). Li ĝuas traduki kaj estis plurfoja laŭreato en la konkurso LIRO (por siaj tradukoj el verkoj de usonaj aŭtoroj, interalie de Edgar Allan Poe, Ambrose Bierce, James Joyce, Jack London) kaj por poezio de usona poeto Jay Lake en konkurso aranĝita de Esperanto USA). Helpanto al Reta Vortaro, Vikipedio, Lernu.net, ktp. Studentoj en la Interlingvistikaj studoj en Poznano. Interesas lin la historio kaj kulturo de Esperanto kaj lingvaj problemoj pri tradukado, gramatiko, terminologio, ktp. Antaŭe li laboris kiel programisto; nuntempe li instruas la anglan kaj tradukas. Li ankaŭ tre ĝuas goon kaj aliajn tabulludojn (kaj tradukis regulojn de pluraj tiaj en Esperanton). Per la restado en Eŭropo li aparte ĝuas pli facilan oftan aliron al internaciaj Esperantaj eventoj ol kiam li loĝis en Usono. Li estas vegano. La ĉi-suba poemo estas originale verkita por la konkurso dum Ago-Semajno en Slovakio kaj per ĝi li gajnis la 2an premion. Pliaj informoj pri liaj tradukoj:

http://eo.blackfreighter.com/wiki/Miaj_Esperantaj_tradukoj

* * *

R

Modeste mi montras mian mo-miksajon.

U

Mia misio manskribi multe, metante "m", meditigis min.

S

Minimume mi memoru mian moton: mo-umu!

S

Mi manskribis manie. Mi movis, manovris, malkovris, masakris, misatakis, miksias, markis, makulis, muelis, martelis, mezuris, metaforis, mont-Parnasumis, Mors-kodumis, misgramatikumis misege.

Multaj momentoj malaperis.

Multaj minutoj malaperis.

Multaj matenoj malaperis,

Multaj monatoj...

W

Malvere - mi misparolas, mi mensogas!

I

Mia manuskripto maturiĝis. Mispaŝoj marŝis malproksimen.

Malplaĉaj malglataĵoj mildiĝis, moliĝis.

Malgraŭ mia maldiligenta mispensa mezkompetenteco, mi mem manskribis mane malaĉan manuskripton montrantan multajn mal-vortojn.

L

Malgraŭ mia malmagra mo-komenco, mankis matematika multiplika metodo.

Momentojn malantaŭe, mi memoris mal-vortojn.

L

Memkompreneble multegas multaj magiaj mirindaj mojosaj mal-vortoj malfiniĝantaj mo-e.

Mal-vorta magazeno maletas! Mi malhonte malevitis multajn maltaŭgajn maljustajn mal-vortojn.

A

Mal-vortoj malmankas malmalvere!

M

Mokemaj malsaĝuloj memoru:

Mo-vortoj mojosas!

Mal-vortoj malaĉas!

S

Mokaj murmuroj mortu! Mi malmalsukcese malkomencis, mal-ve!

Malbonvolu!



SAVA MATETIĆ-LUČIĆ (1920-2009)

Zagrebanino laŭ loĝadreso (kien ŝi translokiĝis en 1951), ŝi naskiĝis la 2-an de januaro 1920 en Ronjgi-Viškovo apud Rijeka. Ŝi estis kuzino de la konata kroata poeto Ivan Matetiĉ Ronjgov. Kvankam ŝi malfrue aktiviĝis (en 1995/96), ŝi interesiĝis pri Esperanto jam en 1936, kaj unuafoje vizitis Esperanto-kurson en 1953. Ŝi estis unu el la plej aktivaj membroj de Esperanto-societo "Bude Borjan" en Zagrebo, respektive ĝia plej maljuna membro, kaj ofta helpantino de Kroata Esperanto-Ligo. Kiam fondiĝis Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj, ŝi aliĝis

inter la unuaj, kaj aktive subtenis finance aperadon de la revuo "Zagreba Esperantisto". Tiujn, kiuj konis ŝin, ŝi aparte impresis per sia pozitivisma starpunkto, juneca optimismo kaj nesimileco al siaj samgeneracianoj. Ŝi estis aktivega montgrimpano, verkis poemojn, ŝakludis, keĝloludis, dancis, finis informadikan kurson kaj bone uzis poŝtelefonon, SMS-mesaĝojn ktp ... Ŝi vizitis plurajn Esperanto-aranĝojn en diversaj landoj: Hungario, Nederlando, Danlando, Francio, Ĉeĥio, Slovakio, Italio. El la rondo de zagrebaj kaj kroataj esperantistoj la morto forprenis



ŝin la 11-an de januaro 2009. La familianoj enterigis ŝian cindron en la naskiĝvilaĝo Viškovo. La vespero honore al Sava okazis en Esperanto-Societo "Bude Borjan" la 21-an de januaro.

TONĈI VUINAC (1930-2009)

Laŭ la informo el "Jutarnji list", la 2-an de februaro forpasis la 79-jara TONĈI VUINAC. Li naskiĝis la 27-an de majo 1930 en Gradac apud Makarska kiel filo de poŝtestro Matko Vuinac kaj Andrijana Dragičević (ambaŭ devenantaj el Zaostrog). Elementan lernejon li finis en Sibenik, kie tiutempe lia patro estis poŝtestro, kaj gimnazion en Osijek, kie li faris

ankaŭ abituriantan ekzamenon. Medicinon li studis en Medicina fakultato en Zagrebo, kaj li diplomiĝis en 1958. Tuj post la akirita diplomo li eklaboris en Urĝa medicina helpo en Zagrebo, kie li laboris pli ol 40 jarojn. Fine de sia profesia kariero li laboris kiel prizona kuracisto dum du jaroj, kaj pensiĝis en 2001/2002. Li estis escepte grava toksikologo, kaj gravas liaj fakaj prelegoj el

tiu medicina branĉo. Li tre ŝatis lingvojn, kaj lie stis perfekta uzanto de la angla. Dum du mandatoj lie stis prezidanto de Kroata toksikologia societo. Dum siaj studentaj jaroj, kune kun sia fratino Blanka, li estis unu el la plej aktivaj membroj de Studenta Esperanto-klubo en Zagrebo, kaj post eli estis membro ankaŭ de Esperanto-societo "Bude Borjan". Pro la profesiaj devoj li forlasis Esperanton, kvankam li ĉiam restis pasiva esperantisto. Lia edzino estis Vesna kaj li havas du filojn: Igor kaj Vedran.


Li estis entombigita en Zagrebo la 7-an de februaro 2009.

KONKURSO PRI SCIO DE ESPERANTO OKAZOS MAJE EN KOSTRENA

La tradicia Konkurso pri scio de Esperanto por lernantoj el elementaj kaj mezlernejoj, ĉi-jare okazos inter la 22-a kaj 24-a de majo en Kostrena. Pri tio informas nin la Esperanto-societo Rijeka kaj la organiza komisiono (Boris Di Costanzo, Tea Radovanović kaj Josipa Katunar). En la programo de la konkurso estas antaŭviditaj jenaj eroj: interkona vespero (la 22-an), konkurado en la elementlernejanaj kategorioj A (komencantoj) kaj B (progresintoj), kaj mezlernejana (la 23-an), sinprezento de Kroata Esperanto-Junulara Asocio kaj ekskursoj al la urboj Rijeka kaj Opatija (la 23-an), amuzvespero (la 23-an), disdonado de diplomoj (la 24-an). La loĝado estas organizita en la Espernato-domo en Kostrena. La organizantojn invitas ĉiujn teamojn aliĝi. La popersona partoprenkotizo de 300,00 kunaĵoj inkluzivas loĝadon, manĝojn kaj ekskursojn.

SIMBOLISMO KAJ ABSURDO

Anna Maria Dall'Olio, *TABELO*,
Edistudio, Pisa, 2006, p. 55



Unuakta teatraĵo, tre mallonga, sed kosistiganta deknaŭ scenojn, lingve nekutime akra kaj amara, kun la temo ŝajne simpla sed ampleksa, plena da simbolismo, aludemo kaj Beket-eska absurdeco - tio ĉi estas ĉefaj karakterizoj de nova drama verko de jam konata itala kaj Esperanta verkistino Anna Maria Dall'Olio (1959). La dramon oni ne facile perceptas ĉar la aŭtorinon multe pli interesas abstraktaĵoj anstataŭ realo, psikologiaj personaj duobliĝoj kadre de interpersonaj dramaj rilatoj anstataŭ la klasikaj formoj dialogaj. En la aŭtorina vizio unu sama afero - aŭ persono povas havi diversajn nomojn aŭ nociojn ĉar la komplika mondo de la aŭtorina filozofia-fantasta poetiko postulas pli larĝan sinonimaron ol en la nuntempa mondo ekzistas. Sed se io ne ekzistas oni ĝin simple devas krei. Literaturo ja estas senlima imperio de la libereco! La Beketa influo estas frapa, la aŭtorino evidente ankoraŭ ne akiris propran identigan poetikon.

✍ Zlatoje Martinov

Neniu el la ĉefaj herooj dramaj havas la stabilan personan mensan strukturon: kvankam alparolas ŝajne afable, baldaŭ montriĝas ilia enviemo, mensogemo kaj fakta duobla vivo, duobla personeco. La drama historio estas simpla kaj por la eventuala leganto ne tre alloga: en iu entrepreno alvenas la novdungito, iomete timema, la kvar aliaj dungitoj (du oficistoj kaj du oficistinoj) volas lin obeemigi kaj fari lin viktimo de iliaj intrigoj kaj internaj interpersonaj (amaj, seksaj) problemoj. Montriĝas ĉe la drama fino, ke la novdungito sukcesas ne nur kontroli la situacion sed tute renversi ĝin je sia profito, kaj detruu la tutan (falsan) sistemon de la kvar geoficistoj. Sed plej interesa kaj plej grava por la teatraĵo estas la - far aŭtorino - atentele elektitaj interligoj psikologiaj, antaŭ ĉio tiuj malantaŭvideblaj, intensaj pro pasio kaj fortaj sentoj erotikaj kaj amaj. Ili estas la plej valoraj kontribuoj de la aŭtorino.

La scenoj (ni jam diris, entute 19!) estas tro kurtaj, ofte tute senparolaj, ekzemple la sceno deksepa estas nur unufraza (L/G (malsatege): "La homaro volas min!"), kaj la sekvanta eĉ tute senvorta. Estus tro interese vidi la manieron de ĝia eventuala starigo sur la scenejon. Plejverŝajne oni ricevos la tute alian impreson pri ĉi drama verko. Kvankam teatraĵo estas literatura ĝenro, nur ĝia sursceniĝo igas la necesan vivantan spiron en ĝin, do, la scenejo estas ĝia natura medio kaj nur tiam ĉiu dramo ĝenre kompletiga. Sen la sceneja starigo, ĉu oni povas teatraĵojn entute nomi "teatraĵo"?

HOMAMO

(Paĝo el mia taglibro, 1958)

✍ Ivan Trifonov Minĉev

"... vi ĉiuj estas fratoj ..."
(Mateo 23; 8)

Irinte iufoje, preterpasante benzin-vendejon, mian atenton altiris 10-12-jara knabineto, kiu sidis duonkurbiĝinta en unu angulo de la konstruaĵo. Mi alproksimiĝis kaj obseris ŝin. Ŝi estis tro mizere vestita per eluzita infana trejnkostumo. Pro scivolemo mi demandis ŝin ĉu ŝi estas malsana kaj kion ŝi atendas.

Evidente ŝi estis parolema, kaj viŝinte la okulon kaj la nazon per maniko, ŝi respondis, ke ŝi estas sana. Plenfide ŝi ekparolis pri sia mallonga sed per maldolĉaj eventoj plenigita vivo.

- Mi loĝis tie. (Ŝi permanes montris proksiman loĝdomegon). Mia patrino lavis la ŝtuparojn de la tegmento ĝis la keloj. Dum mia nasko la patrino mortis. Do, kelkajn minutojn post mia naskiĝo mi jam estis senpatrina orfo. Kun mia patro mi daŭre loĝis en ĉambreto en la teretaĝo, en kiu patrinoj lasadis beboĉaretojn. Mia paĉjo daŭrigis teni ordon en la domego kaj ordigi ĝian eksteran aspekton. Foje dum riparado de pluvtuboj li falis el la oka etaĝo sur betonan trotuaron kaj mortis. Mi vidis lian nerekonblan korpon sur la trotuaro.

Post la morto de miapatro, mia vivado tie fariĝis tute neebila. Mi restis sola, sen gepatroj, sen nutraĵoj, sen varmo. Ekde tiam mi ofte vizitadis onklinon Vanja por iomete varmigi aŭ preni trinkakvon. Ŝi tre ofte plej malavare donadis al mi ion por manĝi kaj ĉiam rilatis al mi kiel al sia denaska fratino. De ŝi mi ricevis unuan kareson en mia

vivo, anstataŭ de mia forpasinta patrino.

La proprietuloj de la loĝdomo forigis min, argumentante, ke la ejon oni bezonas por beboĉaretoj kaj por loĝigo de hundoj de la domestro.

Ekde tiam mi troviĝis en kolektivo de infanoj, kies sorto estis simial al la mia. Mi ankoraŭ bedaŭras, ke mi ne povis adiaŭi de tiel ŝatata onklino Vanja. Somere mi provis viziti ŝin, akompanata de mia amikino el la orfejo. La vojaĝo estis ege malfacila - piede ni alvenis ĉi tien, pli ol 80 kilometrojn for. Domaĝe, senrezulte. Ŝia koleginino sciigis al ni, ke la onklino Vanja forestas pro feriado kaj pro serĉado de siaj parencoj. Nia reveno estis ege terura, sed dank'al Dio, la direktoro de la orfejo ne punis nin pro propravola foriro. Nun, duafoje, mi venis

sola, kaj mi nepre atendos ŝin. Mi atendados ŝin ĝis kiam ni renkontiĝos. Se mi ne renkontis ŝin, mi ne revenos en orfejon.

Mi finaŭskultis la sinceran infana plendon, esprimis mian konsenton kaj foriris pro miaj laboroj. Ŝi restis atendi.

Tiu renkonto restis longtempe en mia menso. Mi mem ne povas klarigi la konduton de domegposedantoj: kial ili preferas la hundojn, anstataŭ rigardi la larmoplenajn okulojn de la senkulpa infaneto kiu suferas ne pro sia kulpo. Evidente ŝi bezonis iom da homa helpo. Ŝi tute ne bezonis aldonan turmenton.

Aŭtune mi denove pasis apud la benzinstacio. Vendistino estis alia virino, kiu rakontis al mi detale, ke la onklino Vanja akceptis la ĉarman knabinecon,

kaj ke ŝi loĝas kun ŝi en ŝia domo.

Instinkte mi turniĝis al eta oficejo de la vendistino, kie mi rimarkis la onklinon Vanja kun la knabineco bone vestita per lerneja uniformo, tenanta lernolibron. Laŭ iomete ridantaj vizaĝmieno mi konkludis, ke ili estas feliĉaj. Per fingro mi leĝere frapis la vitron, mansvinge salutis kaj ŝajne gratulis ilin. Ili respondis kapsigne. Mi opiniis, ke tiumomente mia ĉeesto estas nenecesa, pro kio mi daŭrigis veturadon. Mi sentis, ke miaj okuloj eklarmis pro kortuŝo. Pro la sento, ke ankoraŭ ekzistas bonkoraj homo, kiuj pretas helpi aliajn homojn bezonantaj animdorloton, leĝeran kareson surkape kaj varman ĉirkaŭprenon.

Bedaŭrinde, lastatempe homoj kaj la homaro mem restas for de suferantoj.

ĈU MORGAŬ

Roger Imbert

Hodiaŭ finiĝis bela rakonto. Ĉar la belaj rakontoj ĉiam finiĝas. Nur la malbelaj ne havas finon sed oni ĉesas ilin legi. Aŭ ... Ne, mi ne plu scias. Eble estas tamen inverse. Mia rakonto estas simila al miloj da aliaj sed ĝi estas la mia. Kaj la via, kara. Sed ĉu vi vere volas, ke ni finu ĝin? Aŭ ni ĝin daŭrigu morgaŭ, psotmorgaŭ, ĉiun tagon de la vivo? ...

Mi memoras nian unuan renkonton. Tiun tagon mi sidis en montodomo kun hazarde renkontita societo. Nekonatoj. Fremduloj. Estis la datreveno de malsukcesinta geedzeco. Jam de unu jaro ŝi malaperis el mia vivo por sekvi la padojn de sia propra destino. Mi ne pensis pri tio, sed mi estis sola. Sole sola kun mia soleco, kvankam en societo. Ĉirkaŭ mi kantoj kaj ĝojoj. En mia koro malpleno. Kaj subite, vi aperis. Via pado renkontis la mian. Ni konatiĝis. La vojo estis glita, mi prenis vian manon. Ekburĝonis nova vivo en mia

koro. Renaskiĝis espero, kredo, fido al la vivo. Komenciĝis nia rakonto. Hele, flirte al printempo. Ni estis papilioj ekflugintaj de sur la vintraj glacioj. Ni parolis, parolis, ni ridis kaj ĝojis. Nis ĉiis. Niaj lipoj ne renkontiĝis. Sed niaj animoj parolis. Per la muta lingvo de espero. Espero malpermesita ... ĉar via fileto kuris sur la vojo antaŭ ni. Ĉar hejme atendis vin edzo. Atendis vin la ĉiutaga grizo de formortinta amo. Jes, eble tamen malbelajn rakontojn oni ne devus legi ĝis la fino. Sed la kutimoe estas tiel forta. Ni legas por legi. Libron kiun ni ne plu ŝatas aŭ kiun ni ne komprenas ...

Jes, kara. Sed la libron de nia vivo ni skribas mem kaj por ni mem. Dolorigas kiam ni ŝiras unu paĝon. Sed ĉu aŭtoro ne havas la rajton reskribi, reverki? Kaj ni estas niaj propraj aŭtoroj. Kaj la libro de nia vivo estas la libro de nia feliĉo se ni ne timos forŝiri la malbelajn paĝojn por ilin reskribi.

Jam tiom da belaj bildoj povus ilustrati nian libron. Rememoru ekzemple: teatra placo sub la neĝo aŭ kurlpelado dum alia ekskurso, ŝtela interparolo. Kaj ĉu ne estas ankaŭ aliaj? Tiuj, kiuj aperis en niaj kapoj. Tiuj, kiujn ni ne kuraĝis desegni. Viaj lipoj kaj miaj lipoj. Tenera brakumo.

Hodiaŭ vi reiras al via grizo. Malfeliĉa, venkita de la vivo. Vi petas pardonon. Vi regluas la malnovajn paĝoj, kiujn vi komencis iri. Vi sidos, kiel rozo sub kverko, kiu ne lasas ĝin kreski. Ĉu vere, kara? Ne estu rozo, la radikoj ne povus vin porti. Estu vi, estu homo. Homo ne rezignas. Homo ne havas radikojn sed piedojn. Lasu vian kverkon en la arbaro de forgeso. Ekiru laŭ la sunaj padoj de la vivo!

Revenu, donu la manon. Jam morgaŭ. Ni malfermos kune novan ĉapitron. Ni ne metos punkton al nia libro. Ni verkos kaj verkos kaj verkos. Sentime, kuraĝe, feliĉe. Ĉar nur kuraĝaj homoj povas esti feliĉaj. Kaj neniu laciĝos legante nian rakonton. Ĉar ĝi estos la plej bela. La nia.

Do, ĉu morgaŭ?



INAŬGURO DE PROPA SIDEJO

✍ Paulo Roberto De Freitas Carvalho

La 14-an de februaro 2009 matene, okazis la inaŭguro da la nova propra sidejo de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro (AERJ). Post la saluto de la prezidanto de AERJ kaj kanto de Esperanta Himno, veterana esperantisto Jorge Campos de Oliveira, la plej malnova kaj aktiva ano de AERJ, faris mallongan prelegon pri la historio de la asocio. Poste oni transdonis omaĝplatojn al kelkaj personoj, kiuj iam iamaniere helpis la Asocio en la daŭro de ĝia ekzistado. Sekve okazis solena inaŭguro de omaĝplato al la fondintoj de AERJ. La soleno finiĝis per koktelo kun manĝetaĵoj. La nova adreso estas: **Asocio Esperantista de Rio de Janeiro Strato Teofilo Otoni 135/302 - Centro Rio de Janeiro - RJ - Brazilo CEP 20090-080 www.aerj.rj@hotmail.com**



✍ Branko Popović

SAT KONGRESOS EN MILANO



La 82-an fojon kongresante, SAT-anoj kolektiĝos en Milano (Italio) de la 18-a ĝis la 25-a de julio. Kiel kongresejo servos Zumbini Rooms (Via Zumbini 6, <http://www.zumbinirooms.com/>). LKK konsistas el Andrea Montagner (prezidanto, andrea.montagner@arciesperanto.it), Carlo Bourlet, Nicola Ruggiero kaj Camilla Masciadri. Kiel la kongresan temon SAT-anoj elektis "ELMIGRI SENLANDLIME, VIVI SENNACIECE", kaj el la bunta programo menciindas ĉiutagaj frakci-kunsidoj, koncertoj, literaturaj programoj (prezento de ukraina verkisto Dmitrij Cibulevskij), prelegoj "Klasbatalo en Usono" (Jakvo Schram), "Literaturo en Esperanto" (Nicola Ruggiero), kunsidoj de la Generala Asembleo, riĉa ekskursiva programo, aparte dum merkredo (tuttagaj ekskursoj, tri celoj) ktp. Venu kaj ĝuu!

ESPERANTA GRUPO ĈE GRANDA INTERNACIA KARNAVALO EN RIJEKA

✍ Vjekoslav Morankić

La karnavalo en Rijeka, okazanta tradicie ĉiujare meze de februaro, estas unu el la plej konataj en Kroatio kaj Eŭropo. Ĉi-jare, dimanĉon la 22an, la karnavalan paradon partoprenis pli ol 8.000 homoj, kaj ĉirkaŭ 120.000 spektantoj, kaj ĝi daŭris pli ol 6 horojn.

Esperanto-Societo Rijeka jam tradicie havis sian grupon nomita Esperanto-Maskerada Kompanio "Paždroc" (=tohuvaĵo), kiu ĉi-jare prezentiĝis kiel "Padela" (=kaserolo).

La grupo nombris ĉirkaŭ 40 maskiĝintojn kaj havis alegorian ĉaron, sur kiu estis klare videbla la vorto "Esperanto", kiu plurfoje estis menciita ĉe kontrolpunktoj.

En la ĉi-jara karnavala parado cetere partoprenis ankaŭ grupoj el Italio, Serbio, Montenegro, Francio kaj Makedonio.

Ankaŭ sekvontjare Esperanto-Societo Rijeka planas partopreni la karnevalon kaj eĉ pliampleksigi la grupon per eksterlandaj esperantistoj. Se estas interesigantoj por partopreni en la Esperanta-grupo aŭ kiel aparta eksterlanda grupo, tiuj kontaktu la esperantistojn en Rijeka per: esperanto.rijeka@ri.htnet.hr aŭ letere skribante al **Esperanto Societo Rijeka, Blaža Polića 2, HR-51000 Rijeka, Kroatio**.



LA FERVOJSITA CENTJARIĜO EN TRIESTO

La Internacia Fervojsita Esperanto-Federacio ĉi-jare festos sian centjariĝon en la 61-a kongreso de IFEF okazonta inter la 23-a kaj 29-a de majo en Triesto (Italio). Dum la kongresa semajno atendas la kongresanojn ampleksa programo: knsidoj de IFEF-estraro, interkona vespero, libroservo, infombudoj, komuna fotado, faka komisiono, prelegoj pri Triesto, poŝta giĉeto kun porokaza stampo, prezento de libroj kaj aŭtoroj, vizito al la Fervoja Muzeo Campo Marzio, bankedo kaj dancvesperoj, vizito de Kastelo Miramare, prelego pri komputilaj programoj kaj pri itala literaturo, orgena koncerto en la Preĝejo de B. virgulino de l' Rozario, tuttagaj ekskursoj al Aquileia-Grado kaj Udine-Cividale, prelego pri fervojaj novaĵoj, prezentado de la 62-a IFK, vizito al kastelo Duino kaj mltaj aliaĵoj.

Detale informiĝu ĉe:
<http://www.esperanto.it/trieste/>



Mario Amadei



SIA

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

La lastan plenan semajnon de februare ĉiujare okazas SIA (=Semajno de Internacia Amikeco), kiun esperantistoj tradicie festas en siaj societoj. Ĉi-jare Semajno de Internacia Amikeco estis festita inter la 16-a kaj 22-a de februaro. El Bolonjo, ĝemelurbo de Zagrebo, okaze de SIA ni ricevis jenan mesaĝon de Mario Amadei, sekretario de Bolonja Esperanto-Grupo "A. Tellini 1912":

"Nome de la Bolonja E-grupo "A. Tellini 1912" mi vin ĉiujn kore kaj amike salutas okaze de la 31-a Semajno de Internacia Amikeco, kiun nia Bolonja Esperanto-Grupo festas tradicie ĉiujare. La 21-an de februaro en publika urba salono, ni aranĝis SIA-aranĝon kaj kadre de la Tago de Patrino Lingvo ni programis feston de la Mondo, kiun partoprenis eksterlandanoj el 3 landoj: Pollando, Albanio kaj Bangladeŝo. Oni parolis en 5 lingvoj pri lingvoj kaj kulturoj. Konkludis la publikan SIA-aranĝon agrablaj, bongustaj diverslandaj frandaĵoj."

DUOBLE KONGRESI EN LA ESPERANTO-URBO

Dum Pentekosto, inter la 28-a de majo kaj 3-a de junio, en la Esperanto-urbo Herzberg am Harz (Germanio), oni kongresos duoble. Okazos tie samtempe la 86-a Germana Esperanto-kongreso kaj la 8-a Eŭropa Esperanto-kongreso kun la temo "Signifo de la falo de Berlina muro por interhomaj kontaktoj inter Orienta kaj Okcidenta Eŭropo".

Antaŭvidita estas bunta kaj riĉa programo: publika kantado, koncertoj de Esperantaj kantistoj, partopreno en la tradicia popolfesta procesio, vizitoj al firmaoj, nacia kaj internacia vesperoj, abunda muzika kaj teatra programo, ekskursoj al

Harz-montaro, Sangerhausen, Braunschweig kaj Goslar (urbo de la monda kulturheredaĵo). Detalaj informoj troviĝas ĉe: <http://gek-eek.esperanto-urbo.de/>

Kiel kongresejo servos la loka gimnazio, kaj jam aliĝis ĉirkaŭ 200 kongresanoj. Laŭ la lastaj informoj, loĝadon eblas trovi nur en la ĉirkaŭaj vilaĝoj kaj en la amasloĝejo (10,00 eŭroj potaĝo), kiu troviĝas tuj apud la gimnazio.





Kia granda surprizo kiam mi ricevis la gazeton “Zagreba Esperantisto” Nroj 4/2008 kaj 5/2008, pri kiuj mi multe interesiĝas. Ne mi sola sed ankaŭ kelkaj aktivaj togolandaj esperantistoj kiuj trarigardis la gazetojn zagrebajn. Unuflanke, mi petegas al la redakcio daŭre sendadi al mi la gazeton en la kuranta jaro 2009. Aliflanke, ankoraŭ aliaj tri aktivaj togolandaj esperantistoj ŝatus ricevi senpage la saman gazeton. Mi kunsendas iliajn nomojn.

Mi aparte kordankas al S-ro Radento Milošević, pro lia granda kontribuo ĉe la stando en la Universala Kongreso en Roterdamo (Nederlando). Lia klarigo vere montris, ke ankaŭ en Kroatio, la Esperanta movado glate progresas. Mi persone dankas la anojn de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj, kiuj ne forgesas nin afrikanojn sendante informojn el Esperantujo, revuojn aŭ gazetojn. Mi insistas kun peto al vi, ke tia rilato inter Kroatio kaj Afriko restu ankaŭ estonte.

Mi scias, ke la redakcio de “Zagreba Esperantisto” ŝatus publikigi en la gazeto la senditaĵojn de alilandaj esperantistoj. Tial mi petas diskonigi la blogojn de mia amikino Nubia Litsen el Brazilo: www.mondodececilia.blogspot.com kaj www.esperantomondo.blogspot.com. Tiuj ĉi blogoj povas helpi komencantojn elerni Esperanton. Kelkaj tekstoj estas tradukitaj el la franca kaj angla lingvoj kaj povas helpi la lernantojn aŭ studantojn tre bone profundigi la lingvokonon. La blogoj ĝenerale estas faritaj en tre bona stilo. Tial mi kuraĝigas la interesiĝantojn viziti ilin kaj prove eltrovi kion

la blogoj ĝenerale enhavas. Mi antaŭdankas la redakcion kaj la interesiĝantojn.

**AGBOLO Efoé A.
(Togolando)**

La titolo “Zagreba Esperantisto” jam la 8-an fojon garantias (la 4-an ĉi-jare), ke malantaŭ ĝi troviĝas multa leginda materialo, ne sole rilatanta kaj koncernanta zagrebajn esperantistojn. Cetere estas agrabla impresio trudiĝanta dum la foliumado de tiu ĉi periodaĵo, ke same kiel estas agrable legi ĝin, tiel sendube ankaŭ la redaktoroj ĝuis la pretigon de la periodaĵo. Nu, la kovrilpaĝo prezentanta kvar kroatajn esperantistojn antaŭ la pordo de la CO en Roterdamo kompreneble fote enkondukas en la plurpaĝan, varisegmentan raporton pri la nunjaraj eventoj dum la jubilea UK, inter kiuj ne mankas la kongresa rezolucio kaj foto de la vicprezidanto de Bjalistoko transprenanta la kongresan flagon. Kvazaŭ riverence al la venontjara UK en Pollando, sed ja pro aferkerna enhavo “Zagreba Esperantisto” raportas pri tri majaj eventoj en la sudo de Pollando. Sed gravas ĉi-numere ankaŭ aliaj raportoj, ekzemple pri konferenco de interlingvistoj en la amsterdama universitato, kaj gravas ĝia-kuntekste ampleksaj informoj pri interlingvistiko kaj Esperanto en Universitato de Zagrebo. Cetere necesas mencii pri la baldaŭa, novembra scienca kaj faka simpozio okazonta en la filozofia fakultato de la zagreba universitato pri “Esperanto kaj kroata kultura identeco”. Pri tio ankaŭ informas “Zagreba Esperantisto”. Al la roterdama UK referencas interesa informo pri iniciato de

krotaj esperantistoj konstrui Dokumentan E-Centron en Durdevac, pro la fakto ke ĝi estis la unuan fojon publike diskonigita en Roterdamo. Tiu ĉi centro celas konservi la valoran materialon, kiu dum tridekjara kolektado amasiĝis en privata loĝejo de Josip Pleadin. Ĝi iĝos konsistero de la tuta ĉeno de E-domoj jam troviĝantaj en Kroatio, kiuj kune povos ludi gravan edukon, kulturen kaj alispican rolon por E-o en ĉi tiu lando. Kiel ni eksciis, jam komenciĝis la monokolektado, ne sole inter la kroataj esperantistoj. Alia projekto, pri kiu en sia kvara numero raportas “Zagreba Esperantisto” rilatas al la establo de Mecenata Fonduso. Iniciatis ĝin konata kroata mecenato de Esperanto, Nevan Kovačić, kiu jam sponsoris multajn esperantistajn eventojn. Nun, kiel li klarigas en la preparolata periodaĵo “estus oportune senpersonigi la subtenadon de diversaj meritaj instancoj kaj individuoj aŭ/kaj valoraj por-Esperanta aŭ per Esperantaj (laŭokazaj) agoj aŭ (konstantaj) agadoj unuflanke, kaj aliflanke, ŝajnas al mi same bone formaligi tiun agadon kaj doni al ĝi daŭran karakteron”. En la periodaĵo de zagrebaj esperantistoj multas informoj kun kultura karaktero, kiel tiu pri E-traduko de “Onklo Maroje”, raporto pri la slovena OSIEK-konferenco, pri verkista rendevuo, intervjuo kun Lena Karpunina. Fine la leganto estas invitita al Dubrovnik, ĉi-foje pro la fakto, ke temas pri turisma “Perlo de Adriatiko”, kvankam ni memoras pri la jubileo esperantista solenita tie pasintjare.

**Pola radio,
la 28-an de oktobro 2008**





Saluton nome de Esperanto-USA, la landa organizo de Usono. Mi skribas al vi por proponi eblan kunlaboron inter niaj redakcioj. Jen la ideo: foje en UE mi aperigas artikoletojn (foje beletrajn, sed ne ĉiam) tradukitajn en Esperanton el iu nacia lingvo. Mi preferas kutime NE aperigi tradukojn el la angla, ĉar preskaŭ ĉiuj usonanoj scipovas la anglan, kaj mia celo estas dividi kun la legantoj nur tion, kion ili ne jam povas legi per la gepatra lingvo.

Tamen ekzistas tubero en tiu afero. Usonanoj ne estas aparte bona fonto por tradukoj el lingvoj krom la angla. (Oni preferas traduki el sia gepatra lingvo, ĉu ne?) Tial, iu saĝa leganto demandis al mi, ĉu mi povus interŝanĝi tradukojn aŭ originalajn verkojn kun redakcioj el aliaj landoj -- kie la gepatra(j) lingvo(j) kutime ne estas la angla.

Plej oportunaj por miaj celoj estus artikoletoj ne pli ol 1000 - 1500 vortojn longaj, prefere el fonto indiĝena al via gepatra lingvo aŭ lando. La usonaj legantoj ĉi tie ofte kontribuas tradukojn de tradiciaj usonaj

popolrakontoj kaj poeziaĵoj, dokumentoj historiaj, ktp, kaj ni povus dividi tiujn kun vi. Estus plaĉe aperigi en nia bulteno ion similan, sed el via lando. Nu, ĉu tiu ideo interesas vin? Amike,
Hoss Firooznia (Usono)

Ni kore dankas vin pro la sendita al ni la 5-a numero de ZE. Ni legas ĝin kun granda intereso. Ni estos ege dankemaj, se vi povus plu sendi al ni unu ekzempleron de la revuo. Mi kunsendas al vi artikoleon de nia estrarano Fajzullaev. Se vi trovos ĝin interesa por la revuo, ni estos feliĉaj.

Firdaus Ŝukurov

Mi konfirmas ricevon de la lasta numero de via gazeto por 2008 kaj konfirmas ke mi daŭre ŝatus ricevadi. Mia asocio ne eldonas revuon aŭ gazeton sed se iel vi volas rekompencan per malnovaj gazetoj kiel "Esperanto" aŭ "Monato", estas en ordo.

Prince Henry Oguinye (Nigero)

Tutkore mi dankas vin pro la senditaj senpagaj numeroj de "Zagreba Esperantisto" en 2008.

Se eblas, mi ĝojos ricevi ĝin plue en 2009. Kiam aperos la vica numero de nia informilo "La Pacifika kuriero", mi nepre sendos ĝin al vi.

Aleksandr Titajev (Vladivostok, Rusio)

Animaciajn filmojn en Esperanto mi volas fari. Tiucele mi studas animacion ĉi-jare ĉe filma lernejo. Ĝuste nun mi volas montri al miaj samklasanoj (kaj instruistoj) ke ja ekzistas homoj tutmonde kiuj volas vidi novajn animaciaĵojn en Esperanto. Se vi subtenas mian revon, bonvolu sendi poŝtkarton al mi ĉe la jena adreso:

Simmon Keith Barney, 1111 Pacific St, # 407, Vancouver, BC, V6E 3X7, Kanado.

Se vi volas havi leter-amikojn en Japanio, skribu al **Japania Esperanto-Korespondo-Servo, KLEG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka, JP-561-0802, Japanio**. Skribu ne per reto, sed nepre per afrankita letero aŭ poŝtkarto, kaj preslitere viajn nomon, adreson, aĝon, sekson, okupon, interesojn, ktp. Nia servo nepre sendos konfirman karton al via letero.

(s-ro) MINE Yositaka por Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj (Japanio)

Dankon pro la sendo de numero 5/2008 de "Zagreba Esperantisto". La artikolo je p. 141 (La unua digita gazeto en Kroatio) estis utila kompletigo por artikolo pri simila eŭroponivela projekto "Europeana", kiun mi estis verkanta por la revuo "Monato".

Roland Rotsaert (Brugge, Belgio)



Bosniaj Esperanto-veteranoj kunfestas ĉe Senad Ĉolić en Sarajevo



 *Firdaus Ŝukurov*

TRINKANTA KOLOMBO



INDONEZIA AMBASADORO KAJ ESPERANTO

 *Davor Grgat*

S-ro Mangasi Sihombing, ambasadoro de Respubliko Indonezio por Hungario, Kroatio, Bosnio kaj Hercegovino kaj Makedonio kun la sidejo en Budapeŝto, kune kun la edzino kaj Oktavino Alibudina, la unua sekretario de la ambasado akompanita de Antal Molnár, la ambasada oficisto, la 7-an de marto gastvizitis profesoron Ivan Ŝkaričić, la urbestron de Omiš. La viziton

partoprenis ankaŭ la anstataŭanto de la urbestro, s-ro Mijo Mimica, la urba estrarano Joško Stela taskigita pri turismo kaj la estrino de la protokolo Ivanka Galić. Vizitinte la foiran aranĝon "Gast" en Split, kie prezentiĝis ankaŭ Indonezio, la altrangaj gastoj uzis la eblecon renkontiĝi ankaŭ kun la urbestro de Omiš, kie ili sciigis pri turismaj, historiaj kaj ekonomiaj kapacitoj kaj eblecoj de urbo Omiš kaj regiono de Dalmatio.

La indonezia ambasadoro komparis ke Indonezion kun siaj 242 milionoj da loĝantoj, la landon kiu estas granda kiel Eŭropo, pasintjare vizitis nur ĉirkaŭ 6 milionoj da turistoj, dum Kroation kun iom pli ol 4 milionoj da loĝantoj nur pasintsomero vizitis 10 milionoj da turistoj.

En la interparolo estis tuŝitaj ankaŭ aliaj temoj: religioj kaj lingvoj parolataj en Indonezio. La ambasadoro konstatis ke la hungara estas malfacila por lerni, je kio la urbestro komentis ke ekzistas lingvo tute facila kaj uzebla por internacia komunikado, konigante al la ĉeestintoj, ke la oficiala ĵurnalisto de "Slobonda Dalmacija", kiu raportas pri la renkontiĝo kun la estimata gasto, estas bona parolanto de internacia lingvo Esperanto. Post aliaj demandoj, la ĵurnalisto dum dek minutoj klarigis al la ambasadoro la bezonon de Esperanto, kaj ĝian neŭtralecon kaj internaciecon. La ambasadoro diris, ke li havis la okazon aŭdi pri tiu lingvo dum sia studado antaŭ 40 jaroj, sed bedaurinde li ne povis ellerni ĝin. Tamen, li diris ke paroli la Internacian Lingvon estas granda honoro, kaj ke ĉiuj esperantistoj, devus informi pri Esperanto, memkompreneble unue en la lernejoj ...